

ESPERANTO




Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Esperanto en
la islamajn
landojn**

**Armenio
jardekon post
tertremo**

**UNICEF:
Lerni en la
gepatra lingvo**



Malfermi pordojn en 1999

Vi trovos...

- 1 Noujara mesaĝo de la prezidanto de UEA
Kunlabore trans movadaj limoj
Kep Enderby

- 2 **"NI FARIS VIN POPOLOJ
KAJ TRIBOJ"**

Renato Corsetti

"La dialogo inter
islamaj landoj
kaj la cetera
mondo estas
kriza punkto kie
Esperanto
povas utili."



- 4 Azio
Proksime al dio Balaĝi
Laŭ raporto de V.P. Ranganayakulu

- 5 Eŭropo
Dubla gastamo en Jerevano
Doron Modan

- 6 **Malferma Tago
rompis ĉiujn rekordojn**



- 7 Volontula laboro

**Lerni kaj kleriĝi
esperantisme**

Reinaldo M. Ferreira

- 8 Edukado

Kiu lingvo por edukado?

Laŭ UNICEF, trad. Edmund Grimley Evans

- 9 **NAVIGE TRA TTT-PAĜOJ**



- 10 La diligenta kolegaro

Unu revuo: du jubileoj

Intervjuo kun Aleksander Korĵenkov

- 11 **REAGOJ**

- 12 Forumo

Eŭropo, la lingvejo por ni?

Federico Gobbo

- 13 **RECENZOJ**

Zbigniew Galor pri

Kiu parolas Esperanton?

Detlev Blanke pri

Traktatu d' un Linguaŭ universale

Trevor Steele pri

Kompreni kanguruon

- 15 **LASTE APERIS**



Kaj plue...

- 16 **Fake**

- 17 **Influe**

- 18 **Persone, Foliume**

Oficiala Informilo

- 19 **Anoncetoj, Loke**

- 20 **Forpasoj**

La kovrilo: La "Verda pordego" en Fez, Maroko. (Corel Photos)

Dekstra paĝo: Kep Enderby en la bankedo de la Montpellier UK. (F. L. Veuthey)

ESPERANTO


Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.
Grafiko: Francisco L. Veuthey.
Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.
Redaktofino: la 10-a de ĉiu monato.
Legata en 115 landoj.
Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande (NLG 66; USD 36; DEM 58; JPY 4300 ktp); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas 5,50 gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 2060, 1/2 p. 1150, 1/4 p. 630, 1/8 p. 350, 1/16 p. 190.
Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.
Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).
Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefona: +31-10-436-1044.
Telefaksa: +31-10-436-1751.
Retpoŝto: uea@inter.nl.net.
Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.
Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.
Direktoro de la Centra Oficejo: Pasquale Zappelli.



KUNLABORE TRANS MOVADAJ LIMOJ

En la bilanco pri la agado en 1998 elstaras la 83-a Universala Kongreso en Montpeliero, la plej granda esperantista renkontiĝo de post la Jubilea Jaro 1987. Tiu UK, kiun salutis i.a. la ĝenerala sekretario de UN, imponis ankaŭ per la abundo de sia programo. Feliĉaj tiuj por kiuj ĝi estis la unua UK, ĉar al ili tiu sperto certe estis aparte emocimova!

En 1998 mi precipe ĝojis pro la daŭre kreskanta tendenco al kunlaboro kaj al flankenigo de malnovaj diferencoj kaj kontraŭecoj. En Montpeliero tio konkretiĝis en la unua Strategia Forumo de la Esperanto-Komunumo. Tiu libera formo de kunlaboro denove kolektiĝos en Berlino. Ĝi celas plifortigi la senton de kunaparteno de la partoprenantoj kaj en tiu spirito disponigi ŝancon por interŝanĝo de ideoj. Ni ne revas trovi en ĝi la ŝtonon de la Saĝuloj. Mi tamen fidas ke ĉiu ricevos novajn impulsojn por sia agado kaj ke precipe profitos la kunlaboro trans la limoj kiuj ĝis nun dividis nin.

Rimarkinda ekzemplo pri la nova evoluo estas la proksimiĝo inter UEA kaj SAT. Estante membro de ambaŭ, mi estas aparte feliĉa pri ĝi. Efektive ĉiuj aplaudis tiun evoluon, kiu estas des pli signifa, ĉar UEA kaj SAT estas la ĉefaj fadenoj ĉirkaŭ kiuj teksigis la historio de nia movado. Ambaŭ konstatis ke ili fakte ne estas rivaloj kaj ke el ilia kunlaboro profitos ne nur

ili mem sed la tuta afero de Esperanto. Laŭ ideo de SAT ili jam ekpreparis informkampanjon ĉe pac-organizaĵoj kiel sian unuan komunan projekton.

En sia 90-a datreveno UEA okazigis kune kun la oficejo de la Alta Komisiito de UN pri Homaj Rajtoj seminarion pri la lingva dimensio de la homaj rajtoj, tiel omaĝante ankaŭ al la 50-jariĝo de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj. Estis grave ke sine de la homrajta organismo de UN ni povis atentigi pri la lingvaj rajtoj, kiujn oni daŭre ignoras kaj bagateligas. Kun la sama celo — konsciigi pri ne-konsciata problemoj kaj ĝia eĉ malpli konsciata solvo — UEA organizos en Berlino la duan Nitobe-simpozion pri “Tutmondiĝo kaj lingva diverseco”.

Mia altestimata antaŭulo, prof. LEE Chong-Yeong, iniciatis Kampanjon 2000. La pozitivaj evoluoj kiujn ni nun notas, estas ĉi ties frukto. Kun rekorde vigla partopreno la elektado de komitatanoj B de UEA en 1998 fakte fariĝis referendumo, en kiu la membroj de UEA plene apogis tiun iniciaton. Tamen, Kampanjo 2000 ne estas kampanjo de UEA sola. Ĝi estas celita por nia tuta komunumo, kaj mi tre ĝojas ke tiu invito al agado vere estis akceptita. La nova elano inter ni estas la plej granda atingo de Kampanjo 2000.

Feliĉan novan jaron al ĉiu Esperanto-aganto!

Kep Enderby



Kampanjo 2000: ankaŭ por disvastigi

"Ni faris vin popoloj kaj triboj"

Renato Corsetti - Italio

**Krom en du aŭ tri landoj, Esperanto
ne ĝuas popularecon en la vasta
islama landaro. Kion fari pri tio?**



La esperantlingva versio de *La Nobla Korano* en la ĉapitro 49-a, versiklo 14-a, diras: "Ho vi homoj! Ni kreis vin el viro kaj virino kaj faris vin popoloj kaj triboj por ke vi ekkonu unu la alian". Aliloke ni legas: "La homaro estis unu socio" (ĉapitro 2-a, versiklo 214).

Kvankam ja en pure religia kunteksto, ambaŭ citoj samtempe montras ke certa ideala unueco de la tuta homaro, surbaze de ĝia kreiteco, apartenas al la kerno de islamo.

Sen troigo oni povas aserti ke ekde la plej frua tempo konsideroj pri la neceso interkompreniĝi inter malsamaj homgrupoj estas strikte ligitaj al la tuta islama kulturo. Fakuloj povas abunde dokumenti tion.

Aliflanke, nuntempe amaskomunikiloj en granda parto de la mondo ŝatas prezenti nur la islamajn facetojn ligitajn kun maltoleremo kaj fermeco. Oni forgesas diri ke ofte tiuj sintenoj estas nuraj respondoj al la agresemo (eĉ se nur komerca kaj kultura) de la teĥnologie evoluintaj landoj.




PAKESA

Faciligi dialogojn

Ĉiukaze, kiel oni konkludis en la kongrestema debato en la Universala Kongreso en Montpeliero, necesas por la Esperanto-movado komenci ludi novan rolon de faciliganto de dialogoj inter kulturoj, kaj en la nuna momento la dialogo (aŭ la manko de dialogo) inter islamaj landoj kaj la cetera mondo estas unu el la krizaj punktoj kie Esperanto povas utili.

**Maldekstre kaj dekstre:
renkontiĝoj de la vigla
pakistana Esperanto-**

Esperanton en la landoj de la islama mondo



Diverslandaj ministroj vizitas Esperanto-kurson de s-ino Jila Sedighi ĉe la organizaĵo "Sana Urbo", oktobre de 1997, en la irana ĉefurbo Teherano.

3. Rektaj anoncoj pri Esperanto en arabaj ĵurnaloj aŭ revuoj por instruistoj kaj posta sendado al interesigantoj de lernomaterialoj en eŭropaj lingvoj aŭ en la araba. Kiam vi legos ĉi tiun artikoleon, ver-

ŝajne la unuaj tiaj anoncoj jam estos aperintaj en Jordanujo. Aranĝis la tuton germana esperantistino pere de lokaj konatoj. Al ŝi, Trude Sinno, iru publika danko.

4. Aranĝado de seminario en Teherano ĝuste pri "Dialogo inter kulturoj". (La esprimo ne estas originala sed reprenita de propono de la irana ŝtat-prezidanto farita ĉe Unuiĝintaj Nacioj.)

Ekzistas ankaŭ pli ambiciaj planoj, sed pri ili estas preferinde ne paroli nun, ĉar ili ankoraŭ ne estas faktoj sed nur revoj.

Kiel la legantoj de ĉi tiu revuo povas partopreni en la kampanjo "Popoloj kaj triboj"? Nu, plurmaniere. Se vi havas konatojn neesperantistajn en islamaj landoj, kaj aparte en arablingvaj landoj, kaj vi volas ke oni informu ilin pri Esperanto, simple diru tion al UEA. Se vi vojaĝas tien pro laboro aŭ pro ferioj, ni povos provi kontaktigi vin kun la lokaj esperantistoj. Se vi serĉas korespondantojn, interesigu pri anoncetoj el islamaj landoj.

Vi povas ankaŭ simple donaci monon al la konto de Kampanjo 2000 (el kiu oni finansas ĉi tiun agadon), kaj vi rajtas ankaŭ instrukcii nin pri la maniero laŭ kiu la mono estu elspezita (ekzemple "por anonco pri Esperanto en Egiptujo" aŭ "por sendi lernomaterialon en la angla al la jena listo de miaj konatoj"). Ni garantias ke la mono estos elspezita laŭ via deziro.

UEA havas nun 60 aliĝintajn landajn asociojn tra la mondo. Ĉar Unuiĝintaj Nacioj nombras 185 membro-ŝtatojn, vi facile povas kompreni ke ni ne rajtas ripozi ĝis ni havos 185 funkciajn landajn asociojn. Nur tiam la Zamenhofa diro "por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia", havos sian sencon. ★

Konsciante pri la malforteco de nia movado en pluraj (sed ne ĉiuj) islamaj landoj, UEA komencas nun novan kampanjon (ni nomu ĝin provizore "Popoloj kaj triboj") por disvastigi Esperanton en islamaj landoj kaj tute aparte en arablingvaj landoj.

Tute konkrete, jen tio kion ni jam faras aŭ baldaŭ faros:

1. Eldono de lernomaterialo en la araba lingvo. Eble vi jam legis (en la gazetaraj komunikoj de UEA, aŭ en nov. '98, p. 199) ke finfine realiĝis la revo de nia alte estimata membro Georgo Abraham, arabo loĝanta en Argentino, vidi sian vortaron Esperantan-araban eldonita kaj scii ke liaj vortaro araba-Esperanta kaj lernolibro por arablingvanoj estas jam en la eldon-procedo. Grandan helpon ĉi-rilate donis kaj donas niaj iranaj samideanoj.

2. Kontaktoj kun ĉiuj esperantistoj loĝantaj en arabaj landoj por instigi ilin disvastigi Esperanton per la helpo de UEA.

movado, la sola en la islama mondo kun landa asocio aliĝinta al UEA.





Proksime al dio Balaĝi

La 7-a Nacia Kongreso de Esperanto en Bharato decidis forigi unu literon el la Esperanta nomo de la lando — sed tio ne estis ĉio.

Ĉar la nacia kongreso ja decidis ke ne plu estu uzata la litero *h* en la landnomo *Bharato* (vd. nov. '98, p. 200 —Red.), necesas fakte skribi ke Federacio Esperanto de *Barato* (FEB), la tutlanda E-organizaĵo de iama Hindio, sukcese festis sian 7-an kongreson en la urbo Tirupati de la suda federacia ŝtato Andhra Pradesh.

La FEB-filio en Tirupati funkcias jam tri jarojn sub la gvido de d-ro Ranganayakulu, la sekretario de FEB. Por la kongreso ege laboris la prezidanto kaj la membroj de la filio, s-roj Vijayakumar resp. Prathap, Sudhir kaj Vamsidhar. La kongreso okazis en la junulara gastejo de Tirupati. Alvenis 35 partoprenantoj, el dek diversaj lingvo-regionoj de la lando kaj eĉ el Francio.

Tirupati — urbo kun ĉ. 300 000 loĝantoj en sudorienta Barato, rande de duonseka regiono — ĝuas grandan renomon kiel grava religia centro. Templo en la proksima urbeto Tiru-

mala, kun la dio Balaĝi, estas konsiderata kiel la plej riĉa templo hinda en la tuta mondo. Najbaras ĝin centoj da lernejoj, kolegioj, altlernejoj, temploj, nuptejoj, hospitaloj, bibliotekoj ktp. Tial ke ĉiutage min. 50 000 pilgrimoj svarmas al Tirumala tra Tirupati, ĉi tiu rekte transport-ligiĝas kun preskaŭ ĉiu granda urbo de la lando — kio faciligis la atingon por la kongresanoj.

Inaŭguro kun humuro

Laŭ prof. S. B. Ragunathacharya, vicrektoro de Nacia Sanskrita Universitato kaj fama erudiciulo pri sanskritaj studoj en Tirupati, kiu inaŭguris la kongreson, tuja solvo de la mondlingva problemo per Esperanto ne estas fikcio. Esperanto kapblas servi kiel ponto inter ni, kvankam ni devus lerni ĝin en la plej oportuna tempo, la infanaĝo. Prof.

Probal Daŝgupto, lingvistika fakestro en la Universitato de Hajderabado, rakontis pri la riĉa E-literaturo. D-ro Abdul

Salam, la prezidanto de

FEB, faris al novuloj enkondukon pri E-o en bela angla lingvo, kun humuro. La inaŭgura sesio okazis ja anglalingve, ĉar diversaj invititoj el la tri lokaj universitatoj venis sciigi pri Esperanto. Post la inaŭguro, la kongresanoj kunidis en kvin sesioj po du horoj, kaj faris i.a. jenajn decidojn:

- La nomo de la lando estu *Barato* anstataŭ *Bharato*. D-ro Daŝgupto iniciatis la diskuton por forigi la literon *h*. 24 kongresanoj voĉdone jesis forigi la literon, 4 kontraŭis, la ceteraj ne partoprenis.
- D-ro Ranganayakulu, la ĝisnuna sekretario, demisiis, kaj Jag Narain Sharma el Lucknow (ŝtato Uttar Pradesh, Nord-Barato) elektiĝis kiel nova sekretario por unu jaro. La nova FEB-estraro elektiĝos en 1999.
- Nun estas oficiala la jama “neoficiala paĝo de FEB”, kreita de d-ro Giridhar Rao: <http://www.geocities/Athens/Acropolis/9205/>.
- Sekretario Sharma, kiu jam zorgis pri la 3-a Nacia Kongreso en Lucknow (1986), sondu eblojn organizi tie la venontan, 8-an kongreson de FEB (1999).



Probal Daŝgupto parolas pri la Esperanta kulturo.

Vizitantoj de la kongresejo povis aprezi ekspozicion de libroj en kaj pri Esperanto kaj de aliaj E-aĵoj. Dum la kongreso bone vendiĝis la vortaro de Ranganayakulu, *A Beginner's Compact Dictionary of Esperanto*, kaj aliaj lerniloj kunportitaj de Naren Dholakia, baratdevena brita esperantisto. La kongresanoj plantis kreskaĵojn ĉirkaŭ la junulara gastejo: ili grandiĝu kune kun la movado kaj donu ombron malvarman en varmaj someraj tagoj!

Laŭ raporto de

Venkata Potturu Ranganayakulu - Barato

Junulara gastejo konvenis kiel kongresejo.



Kutime junaj israelanoj faras sian unufojan, neforgeseblan, longan vojaĝon al sudorienta Azio aŭ al Sud-Ameriko. Mi, malsame, ĉiam volis vojaĝi al Trans-Kaukazio, kaj ĉi-aŭtune mi vizitis Armenion dum monato kaj duono. Antaŭ la vojaĝo mi lernetis ame la armenan lingvon, kion mi povis fari sen granda problemo, estante studento pri lingvistiko.

Verdire, mi timegis ke en tiu nekonata lando mi estos tro sola dum ses semajnoj, sed tio montras ke mi konis nek Armenion nek la gastamon de armenoj, precipe de la tieaj esperantistoj.

Urbo por sed sen turistoj

Jerevano, kie mi loĝis, estas granda urbo kun malnovaj konstruaĵoj el belaj ruĝaj ŝtonoj. Ne abundas turistoj — maljuste, ĉar la urbo kaj lando proponas belegajn vidindaĵojn de religio, historio kaj sovaĝa naturo, luksajn hotelojn kaj kulturajn eblojn. Ankaŭ por kristanoj Armenio estas grava, ĉar ĝi estis la unua lando kiu akceptis kristanisman, jam antaŭ 1700 jaroj.

La vivo en Armenio estas nefacila. La akvo ne fluas regule, kaj telefona kontakto, eĉ en urbe, signifas problemon. Se vi miras pri tio ke vi neniam vidis armenojn en Esperantujo, konsideru ke ilia averaĝa monata salajro estas ne pli ol dudek dolaroj. Ili ja vologus viziti eksterlandajn E-araĝojn, sed simple ne povas.

La Jerevana movado estas negranda, sed viglega. En salono de urbocentra kulturdomo renkontiĝas ĉiun semajnon dudeko da precipe junaj aktivuloj, kiuj sen ia programo babilas, rigar-

das lumbildojn, dancas, festas ion. Ili okazigas kursojn kaj multege gastigas siajn tre fervorajn krokodilajn amikojn.

Kandellumo en la E-klubo

Esperanto estas por ili kiel lumeto en la mallumo de malfacila vivo. Antaŭ du jaroj, rezulte de la milito kontraŭ Azerbajĝano, Armenio restis sen

ĉefurbo floras, sed, oni diris al mi, nur dek procentoj el la loĝantaro povas permesi al si sidi en kafejo. Ja duono senlaboras.

La homoj estas speciale afablaj, laboremaj kaj kleraj. Pri ilia gastamo multo direblas. Ĉie, ĉu en bazaro ĉu sur strato, eĉ nekonatoj invitis min al sia hejmo. Se ekzemple mi vizitis iun

hejme, tiu tuj lasis min porti ties pantoflojn, por ke mi sentu min komforte... kaj, magie, mi sentis min post du horoj kvazaŭ frato de la homoj tie. Se armenoj ĝenerale estas gastamaj, imagu la kunmetaĵon de armeno kaj esperantisto! Mi neniam forgesos la afablecon kaj amikecon de kelkaj esperantistoj kiel K'narik kaj Levon, kiuj promenis kun mi eĉ ekster la

Duobla gastamo en Jerevano

Doron Modan - Israelo

Ekde la tertremego en 1988 la E-movado de Armenio malmulte povis aŭdigi pri si — ĝis la aliĝo de Armenia E-Asocio al UEA en 1997.



Doron Modan glas-leve salutas la armenajn esperantistojn.

hejtmaterialoj, nafto, gaso aŭ elektro. Tiu vintro estis infere malfacila. La homoj, rakontis al mi armeno, dormis nokte vestitaj per mantelo sub dika litkovrilo, kaj matene rekte alkuris la ŝuojn. Ĉe multaj homoj la okuloj inflamigis pro malvarmo. Dum tiu evidente malgaja periodo, la Jerevanaj esperantistoj renkontiĝis ĉiusemajne je la lumo de kandelo. La klubo estis tio kio tenis ilin bonhumoraj.

Ekde tiam la situacio pliboniĝis, kaj same la nacia humoro. Ĉio modernigis. Ĉe ĉiu stratangulo staras nun malgranda kafejo, kvazaŭ la tuta Jerevano nur amuziĝus. Videblas ke la

urbo, ne unufoje sed multfoje, kaj ne lasis al mi diri plenkore "dankon". Kvazaŭ memkompreneble, la armenaj esperantistoj sentigis al mi ke mi estas parto de ilia *akumb* (klubo) jam kvin minutojn post mia unua alveno tien.

Ili eĉ festis mian naskiĝtagon (kiun mi mem forgesis) per bongustaĵoj kaj muziko, kaj ripetis la regaladon ĉe mia lasta vizito al la klubo, per aldonado de adiaŭ-donacoj!

Mi rekomendas al ĉiu esperantisto viziti Armenion. Mia koro restis en la ĉiuvendreda renkontiĝo, kaj en Jerevano, kies kodon mi ne plene deĉifris.

Utilaj adresoj

Armenia Esperanto-Asocio: str. Abovjan 3, AOKS, AM-375001 Erevan, Armenio; ☎+374/2/564-514; ☎151-795.

La delegito en Jerevano: s-ino Karine Arakeljan, str. Ĥanĝjan 33-A, AM-375010 Erevan; ☎+374/2/523-426.

Retpoŝte atingebla: s-ro Avetis G. Patatjan, ✉root@aaango-armenio.su.




Kun viaj kontribuoj sendu, se eble, ankaŭ ilustran materialon — tio multe helpas nin. Se vi fotas aŭ disponas pri fotoj, sendu ilin al nia redakcio kun indiko pri ilia aŭtoro. Freŝdataj portretoj de aktivaj esperantistoj estas aparte bonvenaj. Koran dankon!

MALFERMA TAGO ROMPIS ĈIUJN REKORDOJN

La naŭa Malferma Tago en la Centra Oficejo de UEA, la 28-an de novembro, allogis 150 vizitantojn. Tio estas nova rekordo, kiu multe superas la antaŭan (120). Pro la fizikaj limoj de la domo de UEA la nova rekordo apenaŭ plu estos superebla.

La ĉefa gasto estis Claude Piron, kiu fascinis la aŭskultantojn per du prelegoj pri siaj spertoj i.a. kiel interpretisto, kiuj donis al li, kaj sekve al liaj aŭskultantoj, abunde da argumentoj pri tio kial Esperanto estas “la bona lingvo”. Lusi Harmon, “patrino” de la vidbenda kurso *Esperanto: pasporto al la tuta mondo*, prezentis tiun novan 15-lecionan kurson, kies unuaj kvar lecionoj jam estas aĉeteblaj. La nederlanda kantgrupo Akordo koncertis dufoje dum la tago. Oni povis ankaŭ spekti la nederlandan televidan filmon *La postlasaĵo de doktoro Zamenhof* (vd. dec. ‘98, p. 213).

Inter la programeroj la gastoj estis regalitaj per viena kafo, kiun donacis Radio Aŭstria Internacia. Ili havis ankaŭ okazon konatiĝi kun William Harmon — kiu, same kiel Claude Piron, ĉi-jare fariĝis Honora Membro de UEA — kaj kun Michela Lipari, la ĝenerala sekretario de UEA.



Claude Piron



Libroservo:
rekordo de 10 933 gld.

La kaso de la libroservo montris fine de la tago sumon kiun ĝi normale atingas nur dum vigla tago en Universala Kongreso. Temis pri 10 933 gld., kio signifas 55-procentan kreskon kompare kun la antaŭa rekordo de 7 041 gld. (aprilo 1998). Plej multe furoris la libroj *La bona lingvo* kaj *Tien de Piron/Valano*, la kompakta disko *Muzik-pluvo* de Akordo kaj la nova UEA-eldonaĵo *Homaj rajtoj: demandoj kaj respondoj*.

Ĉiuj fotoj: Franĉjo Veuthuy



Akordo koncertis dufoje
dum la tago.

23-27 feb.: Ni parolu Esperante. Gvidas Katarina Hall el Oksfordo.

02-06 mart.: Kiel redakti (Esperantan) gazeton. Omaĝe al Teo Jung kaj Ada Fighiera-Sikorska. Tra la historio de *Heroldo de Esperanto* gvidas Gian Carlo Fighiera.

03-07 apr.: Ornitologia Renkonto. Gvidas Johano Rapley.

13-17 kaj 20-24 apr.: Didaktiko kaj pedagogio por praktikantoj kaj kursgvidantoj. Gvidas Claude Gacond. Du periodoj komplementaj, sed profitige partopreneblaj ankaŭ po unu.

13-16 majo: Vizito de abatejoj. Gvidas Monique Dussenty kaj Thérèse Pinet.

05-10 jul.: Progresiga kurso per la libro *La maŝino kiu kriis*. Gvidas Paul Gubbins.

05-10 jul.: Jogo: inicado kaj praktikado. Gvidas Arlette Plutniak.

Iam en julio: La hispana poezio. Gvidas Miguel Fernández.

17-21 aŭg.: Lernado de naciaj lingvoj per Esperanto.

10-15 sep.: La Esperanta literaturo ekde 1952. Gvidas Ed Borsboom.

KVINPETALO



invitas

Kompletigita programo aperos en januaro. Informoj: Esperanto-Centro Kvinpetalo, FR-86410 Bouresse; ☎/✉+33/5/49-42-80-74.

Lerni kaj kleriĝi esperantisme

Reinaldo M. Ferreira - Brazilo

Fondaĵo Ameriko ebligis al la 25-jara Reinaldo M. Ferreira pasigi trionan jaron da spertiĝo en movadaj centroj kaj eventoj de Eŭropo.

Volontuli ĉe UEA kaj partopreni Universalan Kongreson estis kerna parto de miaj verdaj planoj, ŝpinitaj ie en la fora Brazilo. La perspektivo ekkoni la realon kaj funkciadon de Esperanto en aliaj latitudoj ja impresas interese — precipe al homo kiel mi, neniam transpaŝinta la landlimojn.

Spronis min kroma perspektivo, ĉi tiu certe pli valora: lerni kaj kleriĝi esperantisme.

Okazo por ĉio ĉi venis en julio 1997, kiam la komisiono de UEA pri Amerika agado, kunveninta en Adelajdo, decidis venigi min kun stipendio al Eŭropo. Tiu stipendio, ebligita de pluraj grandanimaj donacantoj al Fondaĵo Ameriko, ĉefe celas primovadan (pli)spertigon de la favorato.

Post kelkmonata prepariĝo, fine en majo pasinta mi povis atingi Nederlandon, kie ekis mia kvarmonata esperantumado.

Ĝia unua ŝtupo kondukis min kiel volontulon ĉe la pint-organizaĵon de la monda esperantistaro. Interesa sperto, kiu ne nur streĉis la muskolojn kaj la cerbon, sed ankaŭ ebligis al mi ricevi pli klaran bildon pri la strukturo de la movado.

De la Centra Oficejo, oni povas havi panoraman vidon pri nia Esperanta universo, tiel vasta kaj multfaceta. Tie



Fondaĵo Vouthay

mirigis min la konstanta amasego da laboro (kaj, kiel mi poste konstatis, la deficiito inter laborkvanto kaj laborforto!).

Cetere, malkiel povus supozi kelkuj, nia internacia stabo ne konsistas el malpragmatuloj, kiuj pasigas la tempon antaŭ kaftasoj, teorie. Ĝi estas sperta teknika skipo ŝarĝita je laboro la tutan jaron: dumonata volontulado en la CO pli ol sufiĉis por tion konstati al mi.

Kroma menciinda sperto en tiu periodo estis mia julia ĉeesto en la Londona Esperanto-Klubo, kie mi (tre amatorece) prelegis pri Brazilo al ĉirkaŭ dudeko da ĉeestantoj.

Montpeliero kaj Hago: lerni, labori, amuziĝi

En Montpeliero, validis por mi la devizo “tage, studi kaj labori; nokte, amuziĝi”. Inter partopreno en Cseh-seminario kaj deĵoro en la budo de Fondaĵo Ameriko, eblis al mi kleriĝi pri pluraj temoj ligitaj al nia lingvo kaj al ĝia movado.

El la vasta programa mozaiko malfacilis tamen elekti la erojn ĝuotajn, ĉar multo interesa kolizii en la tempo. Tiun “perdon” iel kompensis la vesperaj babiloj kaj diskutoj kun junaj movadanoj: tiuj estis diskutoj kiuj riĉigis kvazaŭprelege mian kongresan semajnon.

UK-on sekvis samurbe konferenco de ILEI, kiun mi partoprenis, reprezentante ties brazilan sektion. Same gravaj kaj interesaj kiel la programeroj estis personaj kontaktoj kun diverslandaj instruistoj. Cseh-metodo, Urso-kurso, metodo Freinet, kunagaj ludoj ktp revoluis ĉirkaŭ la konferenca akso.

Resume: riĉa rikolto de scioj, esencaj por mia instruat-kampa Esperanto-aktivado en Brazilo.

Tiun instruan aventuron en Eŭropo kronis 37 tagoj da volontulado ĉe Internacia Esperanto-Instituto en Hago, kie mi plenumis plej diversajn taskojn. Kiel rekompencan por mia laboro, IEI donacis al mi multajn valorajn librojn, kies sendokostojn al Brazilo pagis Fondaĵo Ameriko.

Greziljono devas vivi

La kulturdomo Kastelo Grésillon estas de 1952 “montrofenestro” de Esperanto en Francio. Sed nun super ĝi ariĝas nuboj. Unue, prefekteja komisiono pri sekureco ordonis plibonigi ĝiajn instalaĵojn, prioritate la elektran sistemon. Ĉi lasta laboro estis tuj entreprenita, kontraŭ 400 mil frankoj (ĉ. 135 mil gld.). Sed dua vizit-komisiono juĝis ĉiujn plibonigojn tuj farendaj, kaj eĉ ordonis novajn, por entute 1 miliono da frankoj (ĉ. 336 mil gld.). La kastelo devis nuligi ĉiujn aranĝojn somerajn.

Ĝenerala asembleo la 31-an de okt. serĉis solvon al la krizo. 48 voĉdonis por trovi pagkapablan partneron; 98 por vendi la kastelon kaj aĉeti ion aliloke; 64 por monkollekti inter e-istoj. Ĉar neniu opinio estis absolute plimulta, kaj ĉar proponoj 1 kaj 3 ne ekskludas sin, oni plu studas ĉiujn eblojn. La komitato kunsidos meze de januaro en Bouresse. Kia ajn la decido, donacoj estos uzataj por la bono de Greziljono: Fondaĵo Sekureco, UEA-konto “gres-y”. (Laŭ J.-S. Brilleaud kaj Laŭte!)



Kiu lingvo por edukado?

La lernejo povas esti fremda kaj timiga loko por la multaj milionoj da infanoj kiuj komencas sian klasan laboron en lingvo alia ol la propra.

Devigite adopti duan lingvon kiam ili aĝas nur kvar, kvin aŭ ses jarojn, ĉi tiuj infanoj devas fordoni tutan universon da signifoj por alia nekonata. Ili povas ankaŭ ekkredi ke la lingvo kiun ili konas

Dum tiuj brikoj da scio dispolviĝas, same povas kolapsi la memestimo kaj sento de identeco de la infanoj. Ne estas mirige ke tiel multaj el ili nur pene povas resti en la lernejo kaj sukcesu. Lastatempa studo en Zambio, ek-

spertojn. Ĝi helpas ilin lerni pri la naturo mem de la lingvo, kaj kiel uzi lingvon por fari sencon el la mondo, inkluzive de ĉiuj aspektoj de la lerneja instruprogramo.

Ambaŭdirekta lernado


La gepatra lingvo estas esenca bazo por lernado. Sed ankaŭ akiri kapablon pri tutnacia lingvo, aŭ eĉ tria, internacia lingvo kiel la franca aŭ la angla, havas siajn avantaĝojn. Tio plivastigas komunikadon kaj poste donas pli grandajn eblojn por supera edukado kaj laboro. Indigenaj edukistoj laŭdas tian ambaŭdirektan lernadon, kiu helpas studentojn partopreni en la komunumo kaj ankaŭ en la pli larĝa mondo.

Post la unuaj kelkaj klasoj, kaj almenaŭ ĝis la fino de la bazlernejo, lernejoj kiuj komencis siajn studojn en la gepatra lingvo, devus do ideale aldoni nacian lingvon. Tiu povus esti, ekzemple, okcidenta, iama kolonia lingvo, kiel la franca en Senegalio, aŭ reganta indigena lingvo, kiel la hindia en Barato. Decidi kiun nacian lingvon enkonduki en lernejojn povas tamen esti afero por politika debato.

En multaj landoj la idealo de dulingva edukado malofte estas atingata, malgraŭ tio ke la plej multaj homoj en la mondo kontaktiĝas kun pli ol unu lingvo en sia ĉiutaga vivo. Kulturaj kaj politikaj konsideroj ofte enplektiĝas. Ekzemple, multaj gepatroj kaj decidofarantoj rekomendas dekomencan instruadon en la nacia lingvo kiel vojon al asimiliĝo de la infanoj en la regantan kulturon. Pro tio kelkaj gepatroj ne sendas siajn infanojn al lernejo kiu uzas nur la gepatran lingvon.

Ankaŭ manko de materialoj kaj trejnprogramoj malhelpis dulingvecon. Unua malhelpo: instruistoj eble ne scias la lokan aŭ indigenan lingvon de siaj lernantoj, kaj ofte estas por ili tre malfacile trovi instrumaterialojn en tiuj lingvoj. Krome, eĉ instruistoj kiuj scias la lokan lingvon, bezonas trejnadon kiel instrui la nacian lingvon kiel duan lingvon en la postaj klasoj.

Por registaroj la kostoj ellabori lernilojn kaj kursojn por instruistoj povas esti enormaj, speciale tie kie estas multaj lingvoj. Ekzemple, okcidenta Afriko havas 500 ĝis 1000 lingvojn. Tamen tiujn kostojn oni pesu kontraŭ



Knabinoj vizitas anglalingvan klason en Pakistano.

denaske estas malpli valora ol la lingvo de la lernejo. Lernante kompleksajn fakojn kiel matematiko kaj legado, ili devas respondi al unu el la plej grandaj defioj kiujn ili iam ajn alfrontos, tamen la lingvaj scioj sur kiuj baziĝas granda parto de iliaj penskapabloj, subite estas juĝataj senrilataj al la akuala tasko.

zemple, montris ke la lernejoj kiuj komencis la lernejon per la angla anstataŭ per la gepatra lingvo, ĝis la klasoj tria ĝis sesa ne akiris sufiĉe da legokapablo por bone lerni.

Spertuloj pli kaj pli agnoskas kiom gravas por infanoj uzi la gepatran lingvon kiam ili komencas la lernejon. La uzado de tiu lingvo validigas iliajn

**MULTKOLORA GLUMARKO
IGAS VIAJN KOVERTOJN
PARTOPRENI EN KAMPANJO 2000!**

Prezo de folio (12 glumarkoj): 3,00 gld.
Triona rabato ekde 3 folioj.



la prezo pagata de la socio por altporciaj elfaloj kaj ripetoj en la lernejoj kie tiaj lingvoprogramoj ne ekzistas.

Fremdaj simboloj por fremdaj vortoj

Ĉu ili lernas duan lingvon en la unua klaso, ĉu en la kvara, infanoj ofte baraktas kun nova lingvo, kiu povas esti profunde malsama ol la propra rilate vortaron, frazstrukturon kaj signifojn. Ekzemple, la ĥmera, lingvo indiĝena en Vjetnamio, uzas skribon kiu devenas de sud-barata alfabeto, dum la vjetnama, la nacia lingvo, uzas la latinan alfabeton. La plej multaj infanoj lernas skribsistemon dekomence en la fruaj klasoj, sed tiuj kiuj lernas skribi en nova lingvo, devas venki la obstaklon ligi simbolojn al fremdaj vortoj.

Landoj kiel Ekvadoro faris grandan progreson en dulingva edukado. Bolivio antaŭ nelonge akceptis sian eduk-reforman leĝon por subteni la rajton je gepatra lingvo. Burundio, Kenjo, Ruando, Somalio, Tanzanio kaj Zimbabvo enkondukis gepatralingvan instruadon en bazlernejojn, kaj vilaĝoj en Burkina Faso enkondukis ĝin en lernejojn administratajn de la komunumo. Edukopolitiko en Papua Novgvineo permesas al komunumoj decidi pri la lingvo de edukado por la klasoj unua kaj dua. En Nepalo la Infana Fonduso de Unuiĝintaj Nacioj, UNICEF, subtenas la penojn de la registaro produkti lern-materialojn en kvar lingvoj.

Frua instruado en la gepatra lingvo estas ŝlosila strategio por atingi tiujn pli ol 130 milionojn da infanoj kiuj ne estas en lernejo, kaj helpi ilin sukcesi.

El la UNICEF-eldonaĵo La stato de la monda infanaro, 1999 tradukis Edmund Grimley Evans

Kompreni Kanguruon

unuhora bildbendo pri la 82-a UK kaj ĝia lando Aŭstralio, profesia verko de Roman Dobrzyński

VHS PAL, 63 min.
60 NLG ĉe la
Libroservo de UEA



NAVIGE TRA TTT-PAĜOJ

Jen kelkaj verdaj gutoj el la
inform-oceano de Tut-Tera
Teksaĵo. Sciigu nin pri pluaj
konsultindaj paĝoj Esperantaj!



INTERLINGVISTIKO

La paĝo de Mark Fettes pri esperantologio kaj interlingvistiko: <http://infoweb.magi.com/~mfettes/>. Kun i.a. la artikolo "DLT — faktoj pri finita projekto" de Klaus Schubert, interese komparebla kun la lastatempaj informoj pri la projekto UNL (Universal Networking Language, "Universala Retlingvo") de la Universitato de Unuiĝintaj Nacioj: <http://www.ias.unu.edu> (ĉapitro "Science and Technology", anglalingve), kaj franclingva ĵurnalisma prezento ĉe <http://www.lemonde.fr/nvtechno/futurs/unl.html/>

LANDOJ, REGIONOJ

Federacio Esperanto de Barato: <http://www.geocities.com/Athens/Acropolis/9205/>
Esperanto en Ameriko: <http://www.geocities.com/Athens/Acropolis/1874/>
Finnlando, *Helsinki klubo*: <http://personal.eunet.fi/pp/skau/ekh.html/>
Hungaria E-Asocio: <http://www.c3.hu/~esperantohea/>
Kimrio, la klubo *La Verda Drako* (Newport): <http://www.geocities.com/Athens/9965/>
Luksemburga E-Asocio: <http://www.geocities.com/Paris/Louvre/3714/lea/>
Esperanto-Asocio en Suda Afriko: <http://www.geocities.com/Athens/Forum/1122/>

LITERATURO

La deka aventuro de Ŝerloko Holms — *La Mararmea Traktato* (trad. Dominique Cornice): <http://members.aol.com/esperant61/>

PRAKTIKAJ INFORMOJ

Kalkulado de valutkurzoj en Esperanto: <http://www.oanda.com/convert/classic?lang=eo>

Veterproгноzo tutmonda en Esperanto: <http://esperanto.wunderground.com>

REVUOJ

Kiosko de Sveda E-Federacio ligas al pli ol 6500 gazetoj tutmonde: <http://www.esperanto.se/>. Kunlabore kun SEF, la ĉefa sudsveda ĵurnalo *Sydsvenskan* proponas la saman Kiosko al siaj legantoj en la sveda, angla kaj Esperanto: <http://sydsvenskan.se/links/kiosken.html/>. La franca edukministerio inkluzivis ĝin en sian "elektronikan rimedaron": <http://www.educasource.education.fr/>



TUTMONDECA RIGARDO

Andrew O. Urevbu

Kulturo kaj teknologio



Analo pri la rilato inter kulturo kaj teknologio. Kiel efikas kulturo sur teknologiajn evoluojn? Ĉu kultura evoluo stimulas teknologiajn ŝanĝojn? Ĉu teknologio estas kulture neŭtrala? Kiaj teknologioj taŭgas por evolulandoj? Post ĝenerala studo de tiu problemaro la aŭtoro traktas aparte la historiajn spertojn de Japanio, Germanio, Britio, Francio, Usono, Sovetio, Afriko kaj Ĉinio.

"Helpas akiri pli tutmondecan rigardon al la rolo de kulturo en teknologia evoluo."
(Ulrich Lins)

KULTURO KAJ TEKNOLOGIO. Andrew O. Urevbu. Trad. Johano Rapley. Rotterdam: UEA, 1997. 64p. ISBN 92 9017 053 0. 21 cm. Prezo: 15,00 gld.

Unu revuo: du jubileoj

La Ondo de Esperanto, lanĉita antaŭ 90 jaroj, aperigis decembre sian 50-an numeron ekde la feniksa reekflugo en 1991. Duobla jubileo: bona okazo intervui redaktoron Aleksander Korĵenkov.

■ Kio precize okazis antaŭ 90 jaroj?

De 1905 *Ruslanda Esperantisto* (organo de la Peterburga societo Espero) estis la centra E-gazeto en Ruslando. Sed kiam en 1908 la Peterburga revuo *Vestnik Znanija* ekeldonis supleme ĉiumonatan revuon *Espero*, ĝia redaktoro V. Bitner starigis la kondiĉon ke *Ruslanda E-isto* ne plu aperu. *Espero* vivis nur unu jaron, kaj fine de 1908 la ruslandaj e-istoj restis tute sen revuo. Sed la vasta publiko kreita de *Espero* (ĝin kaj du vortarojn senpage ricevis preskaŭ 100 mil kleraj homoj) kreis favoran legomerkaton. Tiun situacion lerte utiligis Aleksandr Saĥarov, posedanto de la Moskva librejo Esperanto. En februaro 1909 li aperigis la unuan kajeron de *La Ondo de Esperanto* pli frue ol la peterburganoj relanĉis *Ruslanda Esperantisto*, kaj tial *La Ondo* estis kvazaŭ destinita al sukceso.

■ Ĉu la destino plenumiĝis?

Jes. En 1909-17 la legantoj ricevis 101 enhavoriĉajn numerojn. *La Ondo* superis la nivelon de ordinara landa E-gazeto. Dum la unua mondmilito ĝi servis kiel unu el la malmultaj internaciaj e-istaj ligiloj. Se la bolŝevista revolucio fiaskus, ĝi povus havi brilan sorton. Sed la historio ne konas kondicionalon: sub la "proleta diktaturo" ne povis ekzisti privataj revuoj.

■ Do, tiom pri "90", sed kio pri "50"?

1991 restos en la kronikoj pro la malapero de Sovetunio, sed la ruslandaj e-istoj memoras ĝin pro iniciatoj en Jekaterinburg. En 1991 internacie debutis la eldonoj Sezonoj. Okazis la unua translima renkonto Eŭropo-Azio. Estis lanĉita alvoko por Ruslanda E-Asocio. Reaperis la movada informilo *Ruslanda Esperantisto* (RE) kaj la soci-kultura revuo *La Ondo de Esperanto*.

■ Ĉu ne estus pli prudente eldoni nur unu gazeton?

Multaj konsilis simile, ĉar komence de la 90-aj jaroj averaĝa ruslanda e-isto ne po-

vus pagi pli ol kvarpaĝan RE kun la plej necesaj materialoj. La pli ampleksa kaj varia, sed dumonata *La Ondo* havis komence malmultajn abonantojn en Rus-



Komplezo de Aleksander Korĵenkov



Aleksander Korĵenkov

La Ondo de Esperanto aboneblas ĉe UEA: 12 n-roj jare kostas 48,00 gld.

lando, sed kon-servi ĉi tiujn ni opiniis defio invest-praviga. La alia defio estis reteni per *La Ondo* la ruslandajn aŭtorojn kunlaborintajn en la samizdata kultura almanako *Sezonoj*. Ambaŭ taskoj estas plenumitaj.

■ Sed kiel vi sukcesis akurat-ritme transvivi malgraŭ la sociaj kataklismoj?

Ĉefe pro objektiveco, toleremo kaj larĝ-senca sendependeco. Kaj ni ne faris kiel aliaj, kiuj klarigis ke "pro inflacio la kolektitaj kotizoj sufiĉis nur por unu numero ĉi-jare". La libroeldonan profiton ni uzis por

subteni la gazetojn. La simpatio de la publiko konkretiĝis en stabila abonantaro, en cento da kunlaborantoj kaj en oftaj referencoj al RE kaj al *La Ondo* en la internacia Esperanto-gazetaro.

Post ŝanĝoj en la ruslanda situacio eĉ ĉe ni eblas eldoni dignan monatrevuon, riĉiĝi la E-vivon internacie post la longega paŭzo. Do, meze de 1997 ni ŝanĝis eldonpolitikon. La nombro de niaj eksterlandaj aŭtoroj, abonantoj kaj subtenantoj grave kreskis, kaj nia revuo nun rajte nomiĝas internacia.

■ Kia estas la nova Ondo?

En julio 1997 *La Ondo* ensorbis ĉiujn rubrikojn de RE (tiu iĝis ruslingva informilo pri E-o), kaj oni daŭre trovas en *La Ondo* aktualizaĵojn pri la E-agado ruslanda kaj monda. "Tribuno" ebligas profunde diskuti la problemojn de la E-komunumo. Multaj ŝatas *La Ondo* pro la ĉiujara revuo pri la evoluo de Esperanto, la libroeldonado kaj la membrostatistiko de UEA.

Plu aperas beletra originala kaj traduka, precipe el la rusa (Brodskij, Solĵenicin, Ĉeĥov, Puŝkin, Vysockij k.a.), sed ankaŭ Borges, Tolkien, Maupassant... Aperas recenzoj, artikoloj historiaj kaj lingvistikaj, la rubrikoj "Tiel ni vivas" kaj "Arki-vo". Krome: kvizoj, konkursoj, humuro...

Rubriko lanĉita en 1998, "Civilizo", prezentas je la jarmilŝanĝo la homaron en diversaj aspektoj. "Per fremdaj okuloj" konigis jam la impresojn de venezuelano Fernando de Diego pri Pollando, germana danlandano Wolfgang Kirschstein pri Ruslando, ruso Sergio Pokrovskij pri Usono.

Ili kaj aliaj ekkunlaboris nur konstatinte ke ni produktas la revuon ne por ni mem aŭ por fermita koterio da samsektanoj, sed por vasta legantaro, kaj ke, pro estimo al ĉi tiu, ni nepre ne iros la facilan vojon de skandala populareco, pro kiu lastatempe iuj renomaj aŭtoroj ĉesis kontribui al aliaj gazetoj. Cetere, ni ĝuas kunlaboron de William Auld, Mikaelo Bronŝtejn, LEE Chong-Yeong, Ulrich Lins, Giorgio Silber k.m.a.

■ Kion vi planas?

Daŭrigi malgraŭ la nova krizo en la lando. Pliinternaciigi... En 1998 startis nia elektronika versio (<http://www.geocities.com/Athens/Acropolis/3438>), kun koloraj fotoj kaj multaj ligoj. Plej nove: ni iniciatis proklamon de "La Esperantisto de la Jaro", pri kio espereble mi povos raporti en la sekva kajero de *La Ondo*. ★

Reagoj



La cifero de Culbert

Plejparte mi forte konsentas kun K. Kniivilä (nov. '98, p. 165). Sed la demandon "Kiom da personoj parolas la lingvon?" prof. Sidney Culbert (Universitato de Vaŝingtono) jam science esploris. Lia rezulto estis "du milionoj da personoj, plus-minus duonmiliono", ĉe nivelo de vera parolkapablo, se ne perfekta flueco. Tiu cifero aperis en konata anglalingva faktilbro, *World Almanac and Book of Facts*.

Laŭ liaj mesaĝoj al mi kaj aliaj, prof. Culbert provis kontakti ĉiun esperantiston ĉe kelkaj lokoj, nombris ilin, komparis tiun nombron al taksoj pri Esperanto-grupoj, pri librovendado ktp tutmonde, kaj tiel li kalkulis — laŭ mi — sufiĉe fidindan rezulton. Tio estas la sola zorge elkalkulita cifero (do, ne diveno, supozo aŭ onidiro). Mi ne hezitas diri al ĵurnalistoj kaj scivolemuloj ke du milionoj da personoj parolas Esperanton.

Ni ne timu uzi science esploritan ciferon. Per ĝi, Esperanto ne plu aspektas kiel afero de manpleno da stranguloj, sed kiel afero de **granda amaso da stranguloj** grava amaso.

David Wolff - Usono

Disvastiginda

La letero de KIM H. el Koreio ("Kial la angla malsukcesos?", nov. '98, p. 194) meritus tradukiĝi al kiel eble plej multaj etnaj lingvoj por granda disvastigo. Ĉu iu samopiniis?

Edmond Ludwig - Francio

Red.: Ŝajnas ke multaj samopiniis, ĉar ni jam ricevis plurajn petojn pri la angla originalo de la letero (legebla ankaŭ ĉe <http://welcome.to/kea>), kaj francan tradukon disponigis al ni Maurice Sujet.

Sen kongreso pro inundo

Je mia hejmenveno el Pekino post ricevo de la franca vizo, tuj faladis senhalte tre terura pluvo dum duonmonato. Alvenis grandega inundo. La domon kie mi loĝas, la domojn kie oni konservas tabakon, trafis la katastrofo. Mi longe tie laboradis por savi tabakon. Post tio mi devis pli ol monaton labori sur digo kun miaj kolegoj, kvankam mi tre malĝojis, perdinte la bonŝancon vojaĝi al la UK. Mia domo estas en danĝero kaj mi devos transloĝiĝi en majo 1999, pagante 40% de la nova loĝejo.

Mo Zhi-xiong - Ĉinio

Aminda, la knabino kiu nun ekzistas

La recenzanto de la libro *Aminda* skribis (jul.-aŭg., p. 136): "[...] Temas pri knabineto [...], kiu denaske lernas Esperanton. Ŝi tamen neniam ekzistis." Mi informas ke nun ekzistas knabino kun la nomo Aminda. Ĉu koincido kun la verko de L.C. Deij?

E-isto, jam longajn jarojn, uzas E-vortojn por



Aminda kun sia granda frato Dzifa

Komputado de Delfeno Tietti

meti la nomon sur la naskigateston de la filino, kion ne povis fari la aliaj patroj. La knabino Aminda Gbeglo havas nur tri kaj duonan jarojn; ŝi vere ekzistas, sed ŝi estas tute alia ol tiu de la verko *Aminda*. La knabino Aminda nun ekzistanta flustradas E-kantetojn, kiujn ŝia frato Dzifa (pron. *ĝifa*) kantaĉas. La gefiloj ne parolas E-on. Ĉar la patrino ne parolas Esperante, nur la patro devus helpi la gefilojn uzi la lingvon internacian.

Instruisto kaj e-isto, li estas proksima pli al sia skribotablo ol al sia gefiloj, kaj li parolas pli la nacian lingvon ol la aliajn de li konatajn. Tamen la filino Aminda ripetadas kelkajn E-vortojn. Ĉelon s-ro Koffi uzas por E-aĵoj; tial tiun ĉelon la domanoj nomas nacilingve "Esperanto ve home", "la ĉambro de Esperanto". Preskaŭ ĉiutage "Esperanto ve home" eliras ankaŭ el la buŝo de Aminda, kaj ĉiufoje kiam ŝi diras tion, aliaj ridas. Ŝi aŭdigas: "Asipelanto ve home".

Kiuj konas ambaŭ knabinojn Aminda, tiuj asertus ke lingvonivele ili ne similas unu la alian, ĉar la togolanda Aminda ne parolas E-on. Bildonivele, la legantoj tion juĝu mem. Kiam la knabino Aminda parolos E-on, tiam ŝi mem skribos pri si kaj montros pliajn bildojn por konfirmadi sian pluekzistadon.

Delfeno Tietti - Togolando

nomi siajn gefilojn. Mi aŭdis pri la nomo Etulino, konas la filon Preĝi kaj la filinon Benita de la togolanda e-isto KOSSI Logossou. Ankaŭ la ĵurnaskito de SAGBADJELOU Kokou, estrarano de Unuiĝo Togolanda por E-o, havas la nomojn Ami kaj Benata.

La 14-an de junio 1995 naskiĝis la filino de s-ro GBEGLO Koffi. Tiu ĉi ne hezitis nomi sian filinon Aminda. Almenaŭ li kuraĝis

Red.: Tre verŝajne, Aminda Gbeglo eĉ ne estas la sola Aminda de esperantistaj gepatroj; ceteraj Amindaj, anoncu vin!

BAZOJ POR ESTONTA AGADO

ESPERANTO POST LA JARO 2000.

Aleksander Korjenkov.

Diskutkajeroj 1.

Rotterdam: UEA, 1998.

18p. ISSN 1388-2252.

21 cm. Prezo: 4,80 gld.

Triona rabato ekde 3 ekz.



Jena eseo provas distingi bazojn por estonta agado de esperantistoj kaj por kreo de pozitiva bildo pri Esperanto kaj esperantistoj. La aŭtoro montras malfortojn de rutinaj kredoj kaj faras kritikajn notojn margene de Kampanjo 2000 kaj la Manifesto de Prago.

Eŭropo, la lingvejo por ni?

Por doni trafan kadron al iu kohera kaj efika lingv(ar)a politiko, oni devas unue klare konsciigi al si la specialan lingvikan* situacion de la esperanta*. Ĉe la lego de la eseto *Por politiko de Esperanto* de A. Chiti-Batelli (Esperanto-Dokumento 34E, UEA, 1997), ekzemple, okulfrapas ĝuste manko de tia konscio, deviga por ne misvoji la esperantistaron. Miakomprene laŭ la aŭtoro UEA devus lobii en la eŭropaj institucioj por igi la esperantan oficiala federacia dua lingvo por ĉiu eŭropano.

Lingvike la angla konsidereblas kiel “tegmento-lingvo” de la eŭropaj lingvoj — t.e. modela lingvo, el kiu oni kalkeas* aŭ pruntas novajn konceptojn. La problemo estas ke neniu povas garantii ke la esperanta ne kondukos same kaze de oficialigo en EU. Fakte, mi supozas ĝuste la malon. La naturaj leĝoj de lingva evoluo, komunaj por ĉiuj vivantaj lingvoj (kaj la esperanta vige vivas), montras ke la neracio-nivelo de iu lingvo alsupras laŭ la kresko de ties parolantaro. Do, se kaj kiam la esperanta estos parolata amase — t.e. de centmilonoj da homoj —, ege probable ĝi malpli logikos kaj elegantos ol nun. Sekve, ne ĉe logiko kaj eleganteco oni serĉu la tezon por apologii iun politikan vojon.

Lingva reguleco ≠ lingva facile

E-istoj ofte bazas sian politikan tezon sur lingvikaj trajtoj de la lingvo. La tiel konata Paderborna

propedeŭtiko, ekzemple, klopodas demonstri ke frua E-lernado bazlerneje faciligas la lernadon de aliaj fremdaj lingvoj. Bona ideo, nepre respektinda. Tamen, serioza lingvisto ne povas akcepti la ideon mezuri la facilecon de lingvoj. Laŭ kio iu lingvo estas dekoble pli facila ol alia? Ĉu surbaze de sia

Forumo



leksikono? Kia stumbliga grundo!

Oni ne miskomprenu min. Nepre la esperanta estas pli rapide lernebla ol lingvoj ne planitaj, sed laŭ mi ne eblas difini *kiom* pli. Ankaŭ ege pli regula ol la aliaj lingvoj — sed esceptoj en ĝia derivad-sistemo ne mankas. Sed, ĉiukaze, la lingvo-historio montras ke fortaj lingvoj sukcesis iĝi tegmentaj ne pro strukturaj aŭ beletraj kialoj sed ja pro politika puŝo. Do, kio diferencigus la kazon de la esperanta kadre de eŭropa oficialigo disde intaj situacioj?

La esperanta, ĉu lingvo forta?

Por respondi al tiu demando ni vidu la nunan sociolingvikan situacion de nia lingvo. Kio estas “lingvo-forto”? Sociolingvike tiu koncepto koncize analizeblas jene:

- ellabor-nivelo (la ne nur literatura tekstaro-produkto);
- normo-nivelo (kodigo: gramatikoj, vortaroj,

literature modelaj tekstoj);

- viglo-nivelo (la sinteno de la parolantaro al la lingvo).

La esperanta estas nepre forta sur la *ellaborada flanko*: nia lingvo kontentigas la plej grandan parton de la bezonoj en la okcidenta mondo (speciale gravas la teknologiaj fakvortaroj), kaj la prestiĝo de ĝia literaturo pere de la kandidatigo de William Auld al la Nobel-premio kvazaŭ akiris la maksimuman pinton. *Norm-nivelo*: ĝi

havas fortan, eĉ sufokan skribnormon, kiu gvidas la evoluon de la parolata normo. Ĝenerale, lingvoj posedantaj altajn poentojn laŭ la unua kaj dua kriterioj — lingvoj plejparte okcident-eŭropaj — aŭtomate fieras pri bona *viglo-nivelo*. Kaze de la esperanta la situacio malfacile priskribeblas: la plejmulto de ĝiaj parolantoj alte taksas la lingvon, sed ĝia prestiĝo eksterronde ege malaltas, same kiel ĉe multaj lingvoj sen lingvejo (*Sprachraum*).

Kaj se ĝi akiris lingvejon?

Tiu diferenco de la tria nivelo disde la unua kaj la dua forigeblas nur per akiro de lingvejo. Same pro juraj kiel pro ekonomiaj kialoj — ne analizeblaj ĉi tie — la plej probabla lingvejo akirebla estas Eŭropa Unio, speciale kiam ĝi larĝiĝos kun la orientaj landoj. Tempe de unu generacio la lingvo estos instruata en la lernejoj, kaj nepre ĝi iĝos lingvo tegmenta por la aliaj.

Klare: tiukaze parto de nia tradicia ideologia neŭtralismo iros rubujen. Tiam “ĉiuj esperantistoj estos egalaj sed eŭropanoj pli egalaj ol la aliaj”. Ĉu la

esperantistaro tion volas? Mi, persone, jes. Laŭ mi jam nun eŭropano havas avantaĝon. Sed ĉu japanaj e-istoj, ekzemple, volas same? Ni devas ĝentilemane diskuti kaj fine demokrate decidi komunajn agojn.

Enaj bataloj, ekstera indiferento

Pro tiu neklareco de nia volo ni ne kapablis ĝis nun konstrui mondan publikan opinion por aŭ malpor la esperanta, dum Amnestio Internacia ja sukcesis fari tion pri la mortopuno. (Notu ke antaŭ tridek jaroj la ĝenerala publiko indiferentis pri la mortopuno.) Lobii nur institucie — historia kutimo de UEA — tute senutilas, se la granda publiko opinias nenion pri E-o, eĉ supozante ke neniu ĝin parolas. Kiam e-isto forigas tiujn antaŭjuĝojn, ordinarulo sin demandas: “Sed kial mi neniam aŭdis pri ĝi?” kaj pensas: “Baf! Ili ne diskonigas sin, ĉar temas pri elitularo, preskaŭ sekto”. Eblas riproĉi la mondan komunik-sistemon (ekz. ke ĝi pli atentigas sensaciojn ol daŭrajn agojn), tamen nur se ni videblas en tiu riproĉinda sistemo ni sukcesos forigi la akuzon, ne justan sed ne tute malpravan, pri sektecaj trajtoj.


Jene staras la politika problemo: por vekti la mondan publikan opinion pri Esperanto (lingvo kaj socia fenomeno), nepras ne nur tolereme diskuti, sed ankaŭ demokrate decidi la vojon kaj fine agi kiel neregistara organizaĵo. Politikistoj kaj institucioj ĉiam venas en la spurojn de la publiko. Ni fosu nian sulkon en la publikan opinion!

Federico Gobbo - Italio

FEDERICO GOBBO (1974) *ĵus defendis sian tezon pri “La dilemo de Esperanto — Inter helplingva funkcio kaj naturiĝo”, sub la gvido de prof. Fabrizio Pennacchietti ĉe Universitato de Torino.*

*La aŭtoro uzas la esprimon “la esperanta” por la Internacia Lingvo, difference de “Esperanto”, lingvo kaj socia fenomeno.

kalkeo = paŭsaĵo; deprunto ne de vorto mem, sed de ties senco kaj strukturo (ekz. *TutTera Teksaĵo* estas sprita kalkeo de *World Wide Web*)
lingviko = lingvistiko



Recenzoj

Socio

Rigardo en sociologian spegulon

Kiu parolas Esperanton? / Wer spricht Esperanto? Analizo de la Esperanto-movado en Germanio laŭ soci-demografiaj, asoci-politikaj, soci-kulturaj aspektoj. Frank Stocker (1968). Red. Martin Haase. München/Newcastle: Lincom Europa, 1996. 150p. 21cm. Dulingva: germana/Esperanto. 72,00 gld.

Neniu socia movado povas rigardi sin en la spegulo de sociologiaj esploroj sen unue havi ilin. Sen tia spegulo restas nur pripensoj, iluzioj, intuicioj kaj fantazioj pri siaj propraj aspektoj kaj vivstato.

La studo de Stocker daŭrigas jam ekzistantan praktikon pri socilingvistika aŭ sociologia analizo de Esperanto, eĉ se la empiriaj sociologiaj esploroj pri la E-movado estas tre malmultaj (vd. precipe *The Esperanto Movement* de P. Forster, 1982, kaj *La rondo familia* de N. Rašić, 1994).

La esploroj de Stocker baziĝas sur enketo realigita en 1992 inter membroj de Germana E-Asocio (GEA) kaj de Germana E-Junularo. (Klarigi jam komence ke ne nur membroj de E-organizoj parolas Esperante povintus forigi eventualan miskomprenon ĉe leganto ne tro konanta la E-medion.) La ricevitaĵ datumoj estas komparataj kun averaĝaj datumoj pri la loĝantaro de la unuiĝinta Germanio. (Okulfrapas la informo ke nur 10% de la GEA-membroj devenas el la estinta GDR.) Rezulte aperas jena socia portreto de la averaĝa (germana) e-isto: “vira, 49 jaraĝa, trapasis abituron... nun dungito... evangelia, parolas pli ol tri fremdlingvojn kaj lernis E-on pro idealismo kaj lingva intereso. Lin karakterizas socie-emancipigema valorsinteno, pozitiva sinteno rilate al eksterlandanoj kaj al Eŭropa Komunumo” (p. 127).

Laŭ mia scio la unuan fojon sociologia studo pri la E-movado estas legebla samtempe por e-istoj kaj neesperantistoj, ĉikaze germanlingve. Tio metas la temon en la duoblan perspektivon de la demandoj “Kiu parolas Esperanton?” kaj “Kiu ne parolas Esperanton?”. Por la movado kiu celas disvastigadi Esperanton “en la mondo”, samgrade gravas scii kiaj estas “ni” kaj scii kiaj estas “la aliaj” (do, kian sintenon havas “ili” al “ni” kaj al niaj celoj). Kvankam la analizo de Stocker situas en la unua perspektivo, ĝi permesas rimarki ankaŭ la duan.

Avantaĝo de lia aliro estas la nova rigardo sur la karakteron de la E-movado. Temas pri liaj asertoj pri “klara burĝaro” (*Bildungsbürgertum*, p. 128) kaj pri “tri idehistoriaj tendencoj” (p. 83).



Laŭ la aŭtoro, la alta eduknivelo de la GEA-anoj (80% naskitaj post 1955 estas abiturientoj, kompare al 25% de la loĝantaro) “fortimigas” iujn potencialajn membrojn, speciale laboristojn (en GEA 1,7% = 5 homoj) (pp. 18, 21). “Klara burĝaro” — “la opinikreanta tavolo en la moderna demokratio” (p. 129) — regas inter la diversaj tavoloj de la E-movado. La kriteriojn de aparteno al ĉi tiu tavolo Stocker “ne povas kaj ne volas” difini (p. 131), do restas dube ĉu ĝi estu distingita sole per la eduk-nivelo (kiel praktike okazas en la teksto) aŭ ĉu (kiel sugestas Stocker) alimaniere. Forestas ankaŭ difino de “laborista tavolo”. Ĉe certa ĝia kompreno, ĝi estus ja multe pli reprezentata.

La tezo ke la E-movado estas pro sia dekomence intelektula karaktero “laŭstrukture nekapabla integri aliajn loĝantajn grupojn” (p. 129), kaj ke do “Esperanto mem [...] malebligas movadon, kiu superas ĉiujn tavolojn” (p. 131), ne konvinkas, ĉar ĉe sociaj movadoj ne estas tiel ke “simila naskas similan”: ilia intelektula komenco ne determinas ilian socian karakteron. (Bone ilustras tion la historio de la komunisma movado.)

Tri nutraj tendencoj

Laŭ la plej originala tezo de Stocker la sintenoj de la GEA-membroj al sociaj valoroj montras komunecojn kun “tri idehistoriaj tendencoj” el kiuj la E-movado nutriĝas: la laborista movado (socireformema), la kristanisma socidoktrino (kristana) kaj la Novaj Sociaj Movadoj (maldekstre alternativaj) (p. 83). La speco de la valoroj plej gravaj por la membraro difinas ke la E-movado “staras surflanke de progresemaj ideoj” (p. 135), estante pli favora al eksterlandanoj kaj Eŭropa Komunumo ol la loĝantaro kiel tuto. Tiel en la analizo konfirmiĝas ne nur la organizaj (SAT) sed ankaŭ la socihistoriaj koincidoj de la E-movado kun la laborista valor-sistemo. Tio devus des pli allogi laboristojn al la movado. Tamen, kiel montras tion esploroj, estas alie. Se la eduklimo ne estus esenca, kio ĉefe kaŭzus la tiom malgrandan ĉeeston de laboristoj en la movado?

La studo atingas sian celon: “aldoni plian mozaikeron al la bildo de sociologia analizo de la E-movado” (p. 5). La analizo mem ebligas montri ankaŭ fontojn de esplor-malfacilaĵoj. La statistika metodo kiel speco de kvanta aliro en sociologio havas siajn limigojn. Ĝi devigas i.a. konstati la negravecon de statistike malgrandaj fenomenoj. Tial Stocker opinias ke “ekscii la parton de e-istoj en la enloĝantaro estas tute senutile” (p. 129). Tamen, ĉe kvalita aliro, eĉ plej etaj grupoj povas montriĝi tre influaj. Alia problemoj estas ke la aŭtoro ne sufiĉe profitis la kompar-eblojn de iuj variabloj (ekz. sekso kaj profesio ĉe klarigado pri vira supereco inter la movadanoj).

Dank’ al la sociologia spegulo de Stocker oni povas nun pli ekscii pri la esperantistaro kaj samtempe iomete pri tiuj kiuj ne parolas Esperante. Estus bone se tiun ĉi eblon plej vaste uzus nia movado, el kies membraro — laŭ la analizo — 82% komprenas ĝiajn celojn kiel idealismajn.

Zbigniew Galor - Pollando

Frandaĵo el postlasaĵo

Traktatu d' un Linguaŭ universale. Rasmus Kristian Rask (1787-1832). Eldonita kaj komentita de Alicja Sakaguchi. El la dana trad. Ingeborg Zint en la germanan, Leif Kristensen en Esperanton. Frankfurt: Peter Lang GmbH, 1996. 190p. 21cm. 96,00 gld.

Multaj planlingvaj projektoj ĉiam restis manuskript-formaj, nekona-taj. Tiel same la — verŝajne — plej malnova naturalisma projekto, kiun verkis en 1823 unu el la fondintoj de la (historie kompara) hindo-germana lingvoscienco, la dano Rasmus Kristian Rask.

Rask mem neniam atentigis pri sia projekto. Ni trovas informojn pri ĝi nur ekde 1917. Leif Kristensen verkis pri ĝi diplom-laboraĵon en 1978 ĉe Szerdahelyi, kiu mem iom analizis la projekton en hungara libro. Tamen nur nun la projekto povas konatiĝi en lingvistikaj medioj, dank' al Alicja Sakaguchi. Ŝi faris tre ampleksan filologian laboron: ŝi enkondukas en la strukturon de la manuskripto, lokas la projekton en la tipologian kaj historian ĉirkaŭaĵon interlingvistikan. Ŝi prezentas, ĉiam dulingve, la enkondukon de Rask kun liaj argumentoj por universala lingvo (ofte tre similaj al tiuj de Zamenhof) kaj lia interlingvistika filozofio. Sekvas detala prezento de la du ellaborŝtupoj de la projekto. Rask verkis ankaŭ universalan alfabeton, eble same iam eldonotan.

Serioza problemoj de sciencoco: malgraŭ la subtitolo "El la postlasaĵo eldonita", envere ne temas pri eldono de manuskripto. Tiam ja necesus faksimila repro-



dukto de la tuto, kio ne okazis. Sakaguchi ankaŭ novarangis la manuskript-partojn por analizi la tuton. Tio filologie estas dubinda. Tamen, la libro restas frandaĵo por interlingvistoj kaj interlingvistika klerigaĵo por aliaj lingvistoj.

Detlev Blanke - Germanio

Ekkompreni Aŭstralion

Kompreni kanguruon.

Aŭstralio — la lando de la 82. UK. Roman Dobrzyński. Varsovio: la aŭtoro, 1998. 63min. PAL. 60,00 gld.

Roman Dobrzyński faris multajn filmojn en kaj pri Esperanto. Li estas ja ĝisostulo, sed ne plumpe propagandas, ĉar liaj profesiaj spertoj ampleksas multe pli ol Esperanton. Mi dirus ke la plej reliefa trajto de lia laboro estas inteligenta uzado de haveblaj materialoj.

La plej nova filmo ne estas escepto. La ambiguan titolon li tuj klarigas: eŭropano demandis aborigenon pri la nomo de tiu stranga besto; *kanguru* fakte signifas en la lingvo de la respondinto "mi ne komprenas vian demandon". Tio pensigas ke eble la altrudo de eŭropa civilizacio al tiu lasta kontinento baziĝis/as sur miskompreno.

La UK de 1997 okazis en Adelajdo. Ĝi estis relative malgranda; ne okazis elektoj de la UEA-estraro, do ne flamis personaj aŭ ideaj bataloj. La ĥo en Aŭstralio mem tre mallaŭtis. Dobrzyński prudente decidis ke la kongreso mem apenaŭ havigas materialon por filmo, do pri Esperanto mem estas nenio vere nova. Sed li uzis la spektaklan nacian vesperon kiel saltobregon: jen aborigenoj dancas sursceneje, taŭga ekirpunkto por iom esplori la situacion de la aborigenoj; jen aliaj neanglaj aŭstralianoj prezentas programeron, kio permesas esplori la kosmopolitan karakteron de la nuna lando. La muzeoj de Adelajdo donas materialon por iom krokizi la historion de la kontinento dum la eŭropa periodo. Kaj la unikaj aŭstraliaj bestoj ricevas indan atenton.

La dua duono de la filmo estas pli konvencia turisma vizito al Melburno kaj Sidnejo, la du urbegoj. Tio memorigas ke la kanguruoj, koaloj ktp ne rolas en la vivo de la vasta plimulto de la aŭstralianoj, kiuj loĝas en urboj.

Io nova por neaŭstralianoj kies ideoj pri la lando venas de tajloritaj televid-serioj.

Trevor Steele - Aŭstralio/Litovio

Amikeco trans limoj

INTERNACIA SEMAĴO DE AMIKECO

Kiel ĉiujare, la lasta plena semaĵo de februaro (21-27) staros sub la devizo "Amikeco trans limoj". Kreita por konsciigi pri la amikiga rolo de internacia lingvo, ĝi estas aparte taŭga okazo por aranĝi komunan eventon kun neesperantistoj, kun societoj de aliaj movadoj.

ĈU VI SERĈAS KORESPONDAMIKON?


Sendu al *Koresponda Servo Mondskala* jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj dezirataj, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Kunsendu du internaciajn respondekuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. *KSM* transdonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. *KSM* estas servo de UEA.

Koresponda Servo Mondskala
B.P. 6
FR-55000 Longeville-en-Barrois
Francio

KSM

UK Ĝis la 15-a de dec. al la Berlina UK (31 jul.-7 aŭg. 1999) aliĝis 1386 personoj el 54 landoj.

Laste aperis



Alicja Krejči-Lewanderska rakontas ĉion pri Profesoro Selten kaj lia edzino Elisabeth. *Speciala n-ro de Amika rondo*, febr. 1995. Freising. 95p. 29cm. Fotokopioj. 18,00 gld.

Cecco d' Ascoli (1869). Gabriele Rosa (1812-97). El la itala trad. Lina Gabrielli. Ascoli Piceno: Gabrielli, 1997. 79p. 20cm. Dulingva: itala-Esperanta. Eseo pri martire mortinta klerulo itala, samtempulo de Danto. 13,50 gld.

Cervoreĝo (fabeloj). Songvojaĝoj de Adamo Lamo (fabelromano) / A szarvaskirály; Biceg Béci álomutazásai. Éva D. Kovács. El la hungara trad. Tibor Papp. Debrecen: Fábián Bt., 1997. 69p. ISBN 963

Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik, 1998. 120p. 30cm. Germanlingva. Kontribuoj kaj materialoj de interlingvistika kolokvo pri Wilhelm Ostwald (1996), inkl. elekton el ĉi ties korespondaĵoj. 34,50 gld.

Ekaŭdi la animon / Uslyšet duši. Věra Ludíková. Ilustris Jan Moravec. El la ĉeĥa trad. Miroslav Malovec kaj Jaroslav Mráz. Praha: Chronos, 1998. 163p. ISBN 80 902534 0 7. 21cm. Dulingva: ĉeĥa/Esperanta. Poemoj invitantaj al silenta enpeniĝo; "maturaj, pretaj, eĉ definitivaj" (Dr. J. Lebeda) verkoj de aŭtorino kies bibliofilia kvara volumo aperas premiere en du lingvoj. 17,40 gld.

Fundamenta instruo de ŭonbulismo, La. Korea-Esperanta. El la korea trad. Choe

Libro de Ĥanoĥ. *Elektaĵoj el la apokrifajo "Apokalipso de Ĥanoĥ"*. Éva D. Kovács. El la hungara trad. Tibor Papp. Debrecen: Debrecena Bulteno, 1998. 52p. 21cm. Ilustraĵoj de la aŭtorino. "Artalbumo en la servo al la diaj leĝoj" (la aŭtoro). 9,00 gld.

Libro de Krista. Gábor Rudnai (1946). El la hungara trad. Tibor Papp. Debrecen: Debrecena Bulteno, 1995. 24p. 21cm. Poemaro pri amo inter mezaĝa viro kaj 19-jara junulino. 6,60 gld.

Moskvaro. *Originalaj poemoj.* Valentin Melnikov (1957), Klara Ilutoviĉ (1946), Solomon Vysokovskij (1933), Oĉjo Dadaev (1973). Kompilis kaj postparolis Nikolao Gudskov. Moskvo: Impeto, 1998. 96p. ISBN 5 7161 0056 2. 20cm. Impona kvarmana pruvo pri la vivanteco de nuntempa Moskva skolo en la Esperanta poezio. 7,50 gld.

Romepoka Triesto, La. *Arkeologiaj kaj historiaj notoj.* Cynthia Zoben. El la itala trad. Pier Giorgio Soranzo. Trieste: TEA, 1998. 34p. 21cm. Ilus. 15,00 gld.

Sankta instruo de ŭonbulismo, La. El la korea trad. Choe Taesok. Iksan: Ŭonbulismo, 1998. 417p. ISBN 89 86065 01 0. 19cm. Bind. La baza instrulibro de la religio ŭonbulismo: fundamenta doktrino kaj instruoj de la fondinto Sotesano. 36,00 gld.


Soziokulturelle Aspekte von Plansprachen. Red. Ulrich Becker. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik, 1998. 60p. 30cm. Germanlingva. Aktoj de la 7-a konferenco de Societo pri Interlingvistiko (GIL), pri soci-kulturaj aspektoj de planlingvoj. 18,60 gld.

Taal zonder geschiedenis. Marc van Oostendorp (1967). Amsterdam: Tatata Preso, 1998. 36p. 21cm. Nederlandlingva. "Lingvo sen historio": parolado ĉe la inaŭguro de la katedro pri interlingvistiko kaj esperantologio en Amsterdamo, pri la senco kaj celoj de la Esperantaj studoj. 7,50 gld.

Terminaro de feloj. *Názvoslovi kůží.* Lubomír Štěda (1932). Dobřichovice: Kava-Pech, 1998. 95p. ISBN 80 85853 42 6. 20cm. Esperanta-ĉeĥa terminaro kun alfabetaj indeksoj en la angla, germana, hispana, rusa kaj slovaka. 17,40 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA,

Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!



Originala poemaro el Rusio



Dulingva fabelo el Hungario

85545 5 X. 21cm. Ilustraĵoj de la aŭtorino. Dulingva: Esperanta-hungara. 10,80 gld.

Der Esperantist 1(1964)-164(1990), Register. *Teil II.* Ino Kolbe (1914). Red. Detlev Blanke. 1998: 1998. 116p. 30cm. Germanlingva. Dua parto: indeksoj de personnomoj kaj parta represo de la lasta, bibliografia numero de la revuo. 24,90 gld.

Doktoro Glas (1905). Hjalmar Söderberg (1869-1941). El la sveda trad. Sten Johansson. Skövde: Al-fab-et-o, 1998. 89p. ISBN 91 973467 2 1. 21cm. Nekutima, "inversa" krimromano, en taglibra formo, kiu indignigis la hipokritulojn de sia epoko. 14,70 gld.

Eine Sprache für die Wissenschaft. Red. Ulrich Becker kaj Fritz Wollenberg.

Taesok. Iksan: Ŭonbulismo, 1998. 164p. ISBN 89 86065 02 9. 19cm. La baza instrulibro de la religio ŭonbulismo: fundamenta doktrino. 15,00 gld.

Homa voĉo / Vox humana. *Elektitaj poemoj.* Lajos Király. El la hungara trad. Tibor Papp. Debrecen: Departementa Komitato Hajdú-Bihar de Hungara E-Asocio, 1990. 52p. ISBN 963 04 0128 2. 21cm. Popolkanteca poezio kun freŝaj metaforoj. 9,00 gld.

Judismo kaj interreligia kunestado. Rabeno David Rosen. Jerusalem: Centro Sivron, 1998/5758. 8p. 21cm. 1,80 gld.

KAEST '98. *Kolokvo "Aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko"* — prelegresumoj. Prago: Ĉeĥa E-Asocio, 1998. 12p. 20cm. 3,60 gld.

Laste reaperis

Denove havebla ĉe la Libroservo:

Concise Esperanto and English Dictionary. Teach Yourself Books. J.C. Wells. Lincolnwood: NTC Publishing, 1992 (2-a eld.). 9+419p. 20cm. E-angla (9 000 vortoj), angla-E (19 500 vortoj). 39,90 gld.



JUNULARO: Post IJK, RIJK

La organizintoj de la Rijeka IJK invitas al 1-a RIJK: Rijeka Internacia Junulara Karnavalumado (12-15 feb.). La karnavalo kulminos la 14-an per spektakla procesio

de 8000 maskuloj, gvidataj de Moretto, simbolo de la urbo kaj la karnavalo. Kontakto Sanja Bokulić: Brestovice 12, HR-51215 Kastav, Kroatio; ☎/☎+38/51/224-710; ✉esperanto-ri@ri.tel.hr.

ZAMENHOF/ESPERANTO-OBJEKTOJ: Novaj

- Ĉi tiu Zamenhof-busto staras en parko de la brazila urbo Barra do Garças ekde 1995. Esperantisto kaj artisto ĉi-urba, Ciro Gomes de Freitas, ellaboris planon por ke la busto fariĝu monumento. Por entuziasmi pri la ideo la urbestron, skribu al Dr. Wanderley Farias, Prefeitura Municipal, BR-78600-000 Barra do Garças-MT, Brazilo. (A. Carvalho)

- En alia brazila urbo, Caraguatatuba (ŝtato San-Paŭlo), la municipa konsilantaro decidis nomi unu el la centraj placoj "Esperanto". (Brazila Esperantisto)

- En Michendorf, apud Berlino, staras "Esperanto-domo", nomo legebla sur tabulo inaŭgurita fine de aŭgusto. (P. Kühnel)

- La sola esperantisto en Pressagny-L' Orgueilleux (Francio), urba konsilanto Rémy Lebrun, sukcesis donigi al irejo la nomon Zamenhof. (SAT-Amikaro)

- Strato Esperanto estis inaŭgurita en la urbo Sentmenat (Katalunio) la 15-an de nov., en ĉeesto de la urbestro kaj sesdeko da e-istoj. (Boletín, J. M. Galofré)



La Zamenhof-busto en Barra do Garças, Brazilo.

MUZIKO: Devige kanti Esperante


Por celebri la dekan okazigon de la Internacia Ĥoro Festivalo en Malto (10-13 nov.) la organiza komitato decidis elekti kanton en Esperanto kiel devigan por ĉiuj partoprenantaj ĥoroj, kiuj venis el 11 landoj. Temis pri *Penso Printempa* de la malta nacia poeto Dun Karm Psaila, la unua poemo verkita (en 1901) esperantlingve en Malto, kiun muzikigis por kvarvoĉa ĥoro (en 1966) Carmelo Pace, la plej

eminenta malta komponisto ĉi-jarcenta. Laŭ peto de la organiza komitato al Malta E-Societo, la MES-prezidanto d-ro

Carmel Mallia tradukis la poemon en la anglan kaj maltan, kaj sekretario John Vella-Bondin surbendigis la tekston por doni ekzemplan prononcon.

Krom la ĥoro The New Israeli Vocal Ensemble, konkurse gajnis do ankaŭ Esperanto, ĉar ĝi estis menciita en ĉiu reklamo aŭ raporto pri la festivalo. (J. Vella-Bondin)

Komplezo de J. Vella-Bondin



La programkajero de la Festivalo

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun tiuj kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!



FRANCIO: Lingvo de l' koro

En aŭgusto aperis ĉe la franca eldonejo Anne Carrière romano de François d'Épenoux, *Danemark Esperanto* ("Danlando Esperanto"). Temas pri pozitiva metafora uzo de la vorto Esperanto: franca junulo kaj lia dana avino povas interkomunikiĝi nur per la lingvo de sentoj: "iu Esperanto de la koro", laŭ la eldoneja teksto librodorsa.

HISPANIO: Pilgrime, Antaŭen

La ĵurnalo *Diario de León* (2 jul.) artikolis pri "La lingvo de la amikeco": germanaj e-istoj pilgrimis al Santiago de Compostela, akompanate de Augusto Casquero. (*Nia Voĉo*)

- En Avilés la E-grupo Antaŭen aperigis longan "Leteron al ĉiuj amikoj de Esperanto" en la ĵurnalo *La voz de Avilés* la 24-an de sep., kaj la 7-an de okt. informis samloke pri sia nova senpaga Esperanto-kurso.

- En Bilbao la loka televido Canal Bizkaia vizitis la 9-an de okt. la sidejon de la loka grupo okaze de nova kurso. Ilia raporto enkondukis unuhoran programon dediĉitan al Esperanto. La 12-an de okt. du grupanoj estis intervjuitaj ĉe Radio Bilbao pri Esperanto. (*Boletín*)

KROATIO: ZET, la gazet'

ZET ("Zagreba Elektra Tramo") nomiĝas kaj la Zagreba transportkompanio kaj ties monata gazeto. En ZET regule aperas esperantlingva rubriko pri la kompanio kaj la kroatlingva rubriko "Ĉirkaŭ la mondo", kies materialojn kompilas diverslandaj e-istoj. Por ĉi tiu daŭre atendas novaĵojn kaj kuri-

ozaĵojn pri ĉiaj urbaj transportiloj (ne nur tramoj) Marija Belošević: Sveti duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio; mbelosev@public.srce.hr.



El Zagreb — Historia prezento: pydibro

Belega glumarko

kun la simbolo de nia sekva kongreso, la impona Brandenburga Pordego, aperis jam en la Montpeliera UK kaj furore vendiĝis. Ideala ornamaĵo por viaj leteroj en la monatoj antaŭ Berlino. Mendebli ĉe la Libroservo de UEA: po 6 gld. por folio de 24. Triona rabato ekde 3 folioj.



NORVEGIO: Eksteraj iniciatoj

La vicprezidanto de Norvega E-Ligo, Otto Prytz, substrekas en sia ĉefartikolo por *Norvega Esperantisto* (98/5) ke informaj iniciatoj pri E-o en Norvegio pli kaj pli ofte venas el ekster la movado. Plej freŝdate, plurkultura televida programo, Migrapolis invitis (verŝajne pro anonco pri kurso de Atilio Orellana Rojas) por kelkminuta babilo la 26-an de nov. la e-istojn Tamiko Kaŭa-kami-Nielsen, Douglas Draper kaj Otto Prytz.

Ankaŭ inter lingvistoj E-o estas traktata kun objektiveco, spertebla ĉe la lastatempaj prelegoj de Jouko Lindstedt kaj Detlev Blanke ĉe Norvega Societo pri Lingvistiko (kiun en la studjaro 1997/98 prezidis Prytz) kaj de Marc van Oostendorp en la Universitato de Trondheim.

POLLANDO: Intervjuo pri AIS

La gazeto *Ślowo ludu* aperigis la 23-an de okt. intervjuon pri Akademio Internacia de la Sciencoj kun ties senatano, Tyburcuzjusz Tyblewski. (A. Sochacki)

USONO: Esotere

En artikolo de *The New York Times* (9 aŭg.) pri esoteraj societoj en Novjorko intervjuiĝis Jim Medrano, kiu klarigis la celojn de Esperanto. *The New York Daily News* (23 okt.) donis tutan paĝon al E-o: intervjuon kun Tom Eccardt (kiu tenas ekzempleron de nia revuo en siaj manoj) akompanis utilaj frazoj en traduko de Jim Medrano. (*Novjorka Prismo*)

Dua aljuĝo de Thorsen-apogoj

La kolektoj de dek Esperanto-bibliotekoj pliriĉiĝis dank' al subvencio de Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen, kiu en la dua jaro de sia funkciado disponigis por tiu celo 4200 gld. En la unua aljuĝo fine de 1997, kiam la kapitalo ankoraŭ ne estis produktinta renton, tiu sumo estis 3500 gld. (vd. marto, p. 57).

Entute 14 bibliotekoj kaj unu individuo petis subvencion. La UEA-estrarano pri kulturo, Michela Lipari, kaj la ĝenerala direktoro Osmo Buller konsistigis la komisionon kiu decidis pri la aljuĝo, kun asisto de la libroservisto Simo Milojević. La komisiono bedaŭris ke pro manko de alikontinentaj petoj ĝi devis distribui la subvenciojn ĉefe inter eŭropaj bibliotekoj. Ja troviĝas inter la apogitoj unuafoje afrika biblioteko, sed el la movade vigla Latinameriko nek ĉi-foje nek pasintjare venis subvencipetoj. Jenaj bibliotekoj ricevis subvencion:

Hispanio: Biblioteko J. Régulo Pérez (Hispana E-Federacio)	500 gld.
Pollando: Fondumo Zamenhof (Bjalistoko)	500 gld.
Rumanio: Biblioteko de Bazaro (Cluj-Napoca)	500 gld.
Togolando: Biblioteko Ni Ĉiuj (Aneho)	500 gld.
Uzbekio: Internacia Muzeo de Paco kaj Solidareco (Samarkando)	500 gld.
Estonio: Esperanto-Asocio de Estonio	400 gld.
Italio: Kunordigo Esperantista Venetilanda	400 gld.
Svedio: Esperanto-kursejo Lesjöfors	400 gld.
Litovio: Litova Esperanto-Centro (Kaunas)	300 gld.
Nederlando: Internacia Esperanto-Instituto	200 gld.

Subvencipetoj por la tria aljuĝo devos atingi la Centran Oficejon de UEA ĝis la 15-a de oktobro 1999. Ili devas konsisti el listo de dezirataj libroj ordigitaj laŭ prefero, ĉar la subvenciojn oni ricevas ne kiel monon sed kiel librojn. Bonvenas ankaŭ mallonga priskribo de la biblioteko. Konsiderataj estas nur bibliotekoj ne financataj de ŝtata, urba aŭ alia ne-movada instanco.



OLSSON 90-jara

Olle Olsson, Honora Membro de UEA, festas la 8-an de januaro sian 90-an naskiĝtagon en Lund (Svedio).

ÖSTERMAN: Filatelistino de la jaro

Terttu Österman (77-jara), delonga UEA-membro, estis elektita en la aŭtuna kunveno de Filatela Asocio de Finnlando kiel filatelistino de la jaro 1998. Ŝia Esperanta kolekto, videbla en la Tampere UK (1995), gajnis jam multajn premiojn en grandaj ekspozicioj tutmonde. (Vekilo)

PATEK: Arĝenta Blazono

Nia aŭstria ĉefdelegito Leopold Patek (61-jara) ricevis la 6-an de nov. la distingon Arĝenta Blazono de sia loĝ-urbo Klosterneuburg pro siaj meritoj pri interpopola kompreniĝo per Esperanto — fakto menciita de la urbestro d-ro Gottfried Schuh en sia festparolado. (L. Patek, Retinfo)

VARGA-HASZONITS: Doktoriĝo

Zsuzsa Varga-Haszonits (48-jara), gvidanta la E-fakon ĉe Universitato ELTE (Budapeŝto), akiris en decembro hungarian titolon de filologia doktoro. Ŝia tezo temas pri la historio de la naturalisma skolo lingvoplana kaj precipe de Interlingua, kun komparo de la naturalisma kaj skemisma aliroj. Esperanta versio de ŝia hungarlingva verko estas atendata. (B. Vaha, Retinfo)



ESPERANTOLOGIO relanĉata

La revuo *Esperantologio* (eldonitan de Paul Neergaard, 1949-1961) planas revivigi, sub la nomo *Esperantologio / Esperanto Studies*, Christer Kiselman (Upsala Universitato, Matematika Instituto, Pk. 480 SE-751 06 Uppsala, Svedio; ckiselman@math.uu.se, <http://www.math.uu.se/~kiselman>).



Christer Kiselman

La membroj de la redakta komitato estas: Detlev Blanke, José Borges Neto, Probal Daŝ-

gupto, Michel Duc Goninaz, Gotoo Hitosi, Edmund Grimley Evans, Ilona Koutny, Erich-Dieter Krause, Sergej Kuznecov, Jouko Lindstedt, Liu Haitao, Ingrid Maier, Geraldo Mattos, Marc van Oostendorp, Sergio Pokrovskij, Humphrey Tonkin, John C. Wells kaj YAMASAKI Seikō.

La revuo aperos papere ĉe eldonejo Bambu (Varno, jama prizorganto de *Kontakto*), kaj elektronike ĉe <http://www.math.uu.se/esperanto/>, kie jam legeblas detaloj pri la projekto.

RYTJKOV-LIBRO pretiĝas

En majo (p. 98) ni raportis ke Meri Abolskaja (p.k. 381, RU-197022 Sankt-Peterburg, Rusio) kolektas materialojn por memorlibro pri Nikolaj Rytjkov (1913-73). Intertempe ŝi ricevis fotojn, dokumentojn ktp de multaj estoj. La memorlibro baldaŭ pretos; bonvenas antaŭmendoj.

Oficiala informilo

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

SUBTENANTOJ (minimуме \$25): Aŭstralio: Ralph Harry.
AMIKOJ (minimуме \$10): Aŭstralio: Tom Elliott.

PATRONOJ DE TEJO 1999

Finnlando: Heta Kesälä; Akseli Kirsilä; Anja Karkkainen; Liisa Bergman; Tiina Oittinen; Juho Vattulainen; Vuokko Tellervo Heinäsuo. Francio: Marc Savre. Germanio: Gisela Macioszek; Maria Vitalyos; Nora Caragea. Japanio: Hirotugu Hukumoto; Kazuyuki Hosomi; Koichi Kai; Hiroo Kodama. Korea Resp.: F-ino Choi Yun-huy. Nederlando: Anneke Schouten-Buys; Hans ten Hagen; J. Soeteman; Marc van Oostendorp; Saskia J.A. Idzerda; W. L. van Leeuwen.

SOCIETO ZAMENHOF 1998

Hispanio: Pere Julià.

SOCIETO ZAMENHOF 1999

Argentino: Rodolfo G. Calógero. Aŭstralio: J.L.F. Somogyi; Kep Enderby; Ralph Harry. Aŭstrio: Sieglinde Stamm. Belgio: Elfriede Ernst. Finnlando: Heta Kesälä; Irma Heikkilä; Juho Pyykönen; Meri Lehtinen. Francio: André Albault; André Gilles; Jean Gibaux. Germanio: Harry Bily; Bruno Vogelmann; Martin Gründler; Gisela Macioszek;

Julie Winter; Jean Prager. Hispanio: L.E. Hernández García; Rafaela Urueña de Hernández. Japanio: Kyotaro Deguti; Hirotugu Hukumoto; Kazuyuki Hosomi; Akira Morita; Wilhelm Schmid; Nobuyuki Syōzi; Keiko Syōzi; Hiroshi Takahashi; Tume Saitō. Korea Resp.: F-ino Choi Yun-huy. Nederlando: Anneke Schouten-Buys; G.A.M. van Bergeijk; Huibert Oortwijn; Hans ten Hagen; E.C. Klaver; Marc van Oostendorp; Nel Overwater; Sija van Wijngaarden; Simon P. Smits; Wiebren Akkerman. Norvegio: Kjell Peder Hoff; Tamiko Kaūakami-Nielsen. Svedio: Leif Holmlund; Sam Fritz; Tore Fors; Tomas Jansson; Tore Johansson. Svislando: François Randin. Usono: Arnold Victor; Catherine L. Schulze.

DONACOJ (1998)

(NLG) ĝis la 30-a de novembro

Fondaĵo Afriko: Nederlando: T. van Huis 25,00. Svedio: J. Hammarberg 71,55. Sumo ĉi-jara: 26 327,30.

Fondaĵo Azio: Honkongo: B. Mak 21,10. Japanio: K. Esaka 30,71; Esperanto-Rondo de Ehime 30,71; K. Gotou 30,71; T. Huzisima 30,71; T. Koyama 30,71; T. Itabasi 30,71; Y. Izumi 31,65; S. Mitukawa 30,71; N. Miyazawa 30,71; T. Nomura 30,71; T. Takehana 153,55; M. Takezaki 30,71; M. Tamura 78,61; H. Todoroki 30,71; Z. Sibayama 94,95; T. Sugihara 30,71; T. Suzuki 61,42; T. Ueda 31,65; K. Ueno 63,30; K. Yano 30,71. Sumo ĉi-jara: 6513,19.

Fondaĵo Canuto: Germanio: G. Macioszek 67,50;

H. Werner 224,00. Hungario: I. Pethes 7,71. Nederlando: F.H. Kat 95,00; W. van der Veer 100,00; D. van Zanten 50,00. Div. malgrandaj 1,12. Sumo ĉi-jara: 9717,90.

Konto Espero: Nederlando: T. van Huis 25,00. Sumo ĉi-jara: 1348,57.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Fondaĵo Grabowski 307,53. Francio: J. Hénin 9,50; M. Bavant 32,00. Germanio: I. Barenz 56,00; L. Baumgart 56,00; W. Geidel 5,60; H. Huhsal 56,00; A. Putze 22,40; E. Schwarzer 112,00; V. Stegmann 56,00; M. Vogt 33,60. T. Tadaisi 20,00. Div. malgrandaj 1,12. Sumo ĉi-jara: 2736,75.

Volontula Fondaĵo: Francio: B. Bavant 14,00. Germanio: C. Schwarzenstein 1,12; K. H. Sommer 22,40. Nederlando: W. Akkerman 28,00; H. ten Hagen 59,00; Y. van Wijlick 100,00. Sumo ĉi-jara: 2590,05.

Kampanjo 2000: Nederlando: Anonime 50,00; Fam. J.K. Hammer 50,00. Japanio: T. Kobayashi memore al N. Moerbeek 36,20. Sumo ĉi-jara: 46 626,55.

Generala Kaso: Italio: R. Sommi 10,00. Germanio: H. Czirn-Terpitz 63,00; W. Ehlers 7,88; M. Gründler 57,38; O. Hub 3,37; H. Hub 3,37; R. Merath 14,63; W. Murza 7,87; J. Radam 7,88; G. Schmitt 7,88. Nederlando: G.A.M. van Bergeijk 140,00; P. de Blaeij 8,22; A.M.H. Dodebier 95,00; R. van Es 3,00; A. Kriek 3,00; P.H.H. Parren 8,00; J. Verhoeff 8,00. Sumo ĉi-jara: 8704,96.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

MEMORIGAĴOJ DE SINMORTIGINTO.

Fama portugala verkisto, Camilo Castelo Branco, el la astrala mondo diktis libron pri sia vivo, kiel sinmortiginto, per la mediumo s-ino Yvonne do Amaral Pereira, kiel averton al la legontoj. Ĝin esperantigis s-ano Affonso Borges Gallego Soares. La libro havas 646 paĝojn, belan kovrilon kaj bonan paperon. Prezo: 40 USD aŭ egalvaloro, plus afranko 10%. Mendu ĉe UEA aŭ ĉe la eldoninto: Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz, Caixa Postal 3133, BR-20001-970 Rio de Janeiro (RJ), Brazilo.

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton ĉe ripeto de anonceto. La tarifen de anoncoj vd. en la kolofono, sub la enhavtabelo.



ANONCETOJ

D-RO TATJANA VELISLAVOVA DEZIRAS KORESPONDI kun samideanoj el okcidenta Eŭropo pri diversaj temoj. Ŝi preferas ko-

respondi kun kuracistoj kiuj okupiĝas pri homeopatio. Adreso: ul. "Prohlada" 7, ap. 8, 300-Gabrovo, Bulgario.

MEMORAĴOJ DE SINMORTIGINTO. Romano de fama verkisto portugala, kiu suferis en la transmondo dum longa tempo kaj post sia pento trovis en la astrala mondo Akademion de Esperanto. Li verkis la libron per la mediumino Yvonne A. Pereira, tradukitan de s-ano Affonso Soares. Bela kovrilo, bonega teksto, 554-paĝa, prezo 40 guldenoj. Eldonis Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz, Caixa Postal 3133, BR-20001-970 Rio de Janeiro (RJ), Brazilo. Mendebla ĉe UEA.



FRANCIO: Deka Morbeka

En la nord-franca Morbecque pli ol 110 personoj sukcesigis jam 10-an E-rendevuon (7-8 nov.) kun distraĵ aranĝoj kaj diversgradaj rapidkursoj. (Mal-longe)

HUNGARIO: En la telefonlibro

Dank' al insisto de Oszkár Princz, sekretario de Hungaria E-Asocio, en la telefonlibro de Budapeŝto denove aperis (p. 15.) informoj en Esperanto, apud la angla, germana, franca, itala kaj rusa. Princz pledis por la aperigo per la argumento ke ne nur temas pri utila helpo al iuj eksterlandaj turistoj, sed ke la uzo de E-o kontribuas al favora bildo pri Hungario kaj montras konscion pri lingva egalrajteco. Princz aldonis ke "en Hungario ĉ. 50 mil homoj parolas E-on je iu nivelo, kaj en la pasintaj 40 jaroj vendiĝis pli ol 20 mil lernolibroj." Dankesprimojn oni povas sendi al Magyar Telefonkönyvkiadó Kft., Merkataka Direktoro, Baross u. 89, HU-2040 Budaörs, Hungario. (L. Szilvási, O. Princz)

IRANO: Kursoj ĉe Ferdosi


Jam la duan fojon komenciĝis Esperanto-kursoj en la matematika fakultato de Ferdosi-universitato en Mashad. La kursaro konsistas el tri bazaj kaj unu progresaj kursoj, gvidataj de studento de la fakultato, Mohammad Moafi. Partoprenas entute ĉ. 150 gelernantoj. En la tago de la Esperanta libro (15 dec.) en la fakultato estis organizita ekspozicio de Esperantaj libroj kaj gazetoj. (K. Sayadpour, Ret-info)

MEKSIKO-ĈINIO: Avangarda loko

Prezante la parolon en internacia renkontiĝo de asocioj de amikeco kun Ĉinio, pasintan septembron en Jamaiko, Leonora Torres — prezidantino de Meksika Esperanto-Federacio — atentigis ke "Ĉinio okupas avangardan lokon en la monda Esperanto-laboro" kaj sugestis al la partoprenantoj "alproksimiĝi al la E-organizaĵoj" de siaj urboj. (Ni ĉiuj)

UZBEKIO: Taŝkenta Vero

En la gubernia ĵurnalo Taŝkenta Pravda la 12-an de sep. aperis tutpaĝa intervjuo de la loka ĵurnalistino Tamara Sanaĵeva kun Eŭgeno Perevertajlo pri la Montpeliera UK kaj pri Esperanto kiel lingvo.



KIOM DA BANANOJ EBLAS EN AVIO?

Tutmondiĝo 2000 — pri la paca konsumo de l' onto.

Invito partopreni en la **POŝTARTA EKSPOZICIO** okaze de la 84-a Universala Kongreso de Esperanto, Berlino, 1999



Ĉiu, kompreneble, kaj **aparte infanoj**, rajtas kontribui po unu artaĵon, datitan kaj subskribitan (kune kun slipo enhavanta bazajn informojn pri la artaĵo kaj la artisto). Artikoloj pri la temo estas bonvenaj. La kontribuantoj fariĝos posedaĵo de la organizanto. Estos katalogo.

Limdato: La artaĵoj devas atingi la organizanton plej malfrue la 31-an de marto 1999.

Organizanto
NULA HORO

(Internacia artgrupo kun Esperanto kiel komuna lingvo)
Lupiro el Anavalo (Don Mail)
Schulstr. 7, DE-34292 Ahnatal, Germanio.

Libera komunikado kiel artaĵo — horizontala demokratio — Kolektiva kreivo — Nekomerca agado
POŝTARTO — MAILART
Kombinado de poŝte ekspedebila artaĵo (du- aŭ tri-dimensia) kun la poŝta porekspeda prilaborado (poŝtmarkoj, stampoj ktp) — unu el la plej bazdemokratiaj ebloj publike formuliĝi...



Tibor Sekelj

Kumeŭaŭa

Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo, de T. Sekelj. Rotterdam: UEA, 1994 (2-a eld.). 96p. 21cm. Riĉe ilustrita. 15,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.



Arkivo de UEA

Dante BERTOLINI (1911-1998), itallingva poeto el Locarno (Svislando), mortis lastatempe. Mallonge post sia esperantistiĝo, li eldonis en 1979 *El la nova ĝardeno / Dal*

nuovo giardino, dulingvan antologion de la originala E-poezio kun verkoj de dek aŭtoroj.



Studio Rimma, Bukareŝto

Aurel BOIA (1913-1998), veterano de la rumania Esperanto-movado, forpasis la 26-an de oktobro en Bukareŝto. Li lernis E-on 16-jara kaj ekde 1957 gvide rolis en

la landa movado, i.a. kiel vicprezidanto de Rumana Kunordiga E-Komitato (1970-78), de Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko (1978-89) kaj de la refondita Rumana E-Asocio (1990-91). Doktoro pri sociologio, aŭtoro de konata rumana lernolibro de stenodaktilografio, li aŭtoris E-lernilon (*11X11, Esperanto prin pro-verbe*, 1978), tradukis kaj verkis poezion (kvar poemoj liaj aperas en *Esperanta antologio*). 40 jarojn li estis membro de UEA, servante dum la tuta — por Esperanto ofte malfacila — tempo kiel plurfaka delegito en Bukareŝto. Li postlasis manuskripte kolekton da anekdotoj, kontribuon al bibliografio de E-tradukoj el la rumana beletrio kaj esplorojn vortstatistikajn.

Constant BORREMANS (1924-1998) mortis la 8-an de oktobro en Buchholz (Germanio), kie li estis delegito pri turismo kaj muziko. Aktiva de 1954 en sia

naskiĝa regiono Antverpena, li agadis ĉe E-istaj Naturamikoj (TANEF) i.a. kiel kunredaktoro (1991-98) de ties revuo *La Migranto*. Borremans funkciis de 1988 kiel UEA-komisiito pri turismo, tenante superrigardon pri turismaj prospektoj kaj broŝuroj E-lingvaj.

Jelly KOOPMANS-SCHOTANUS (1919-1998), gvidinto de E-diservoj en kongresoj, mortis la 17-an de novembro en Arnhem (Nederlando). Ŝi estis patrino, kun Wim Koopmans, de la denaske E-lingvaj Benata, Donita, Feliĉa kaj Espero.



Arkivo de UEA

Violin OLANOV (1919-1998) mortis la 10-an de oktobro en Sofio. Li komencis lerni Esperanton 14-jara kaj, eksigite el ĉiuj lernejoj de Bulgario pro kontraŭfaŝisma

aktivado, li ekdediĉis sin tute al la Esperanto-movado, unue en la societo Albatro en Varna, kiun li fine prezidis (1944-47). Post studoj en Sovetio (1949-54) li kun-

iniciatis en 1954 la restarigon de Bulgara Esperanto-Asocio, en kiu li servis (1955-64) alterne kiel sekretario kaj vicprezidanto. Li estis ĉefredaktoro de *Bulgara Esperantisto* (1957-64), A-komitato de UEA (1958-64, 1978-85), ano de la Buroo de Centra Estraro de BEA (1976-1989), prezidanto de Internacia Unuiĝo de la Esperantistoj-Filologoj (1963-94) kaj redaktoro de *Filologo* (1974-91). En 1976 li estis elektita en la sekretariaton de Mondpaca Esperanto-Movado kaj iĝis ĉefredaktoro de ties revuo *Paco*.

Estro de la Instrukomisiono de BEA, Oljanov gvidis multajn Esperanto-kursojn. Li verkis lernolibrojn por tri niveloj kaj Esperanto-gramatikojn, poezion sub la pseŭdonimo Zefiro (unu lia poemo troveblas en *Esperanta antologio*), kunaŭtoris *Bulgara-Esperanta Vortaro* (1981), redaktis la artikolaron *Interlingvistiko kaj esperantologio* (1985), tradukis multajn poemojn kaj popolkantojn, kaj aperigis pli ol 1000 artikolojn pri kaj en Esperanto. Oljanov estis membro kaj delegito de UEA kvardekon da jaroj. De 1986 li estis ano de la Akademio de Esperanto.

Julius J. MANSON (1907-1998), Honora Membro de UEA ekde 1995, mortis la 8-an de novembro en Novjorko.

Emerita profesoro, li esperantistiĝis en la aĝo de 70 jaroj, sub la gvido de Mark Starr, kun sia edzino Elizabeth (1910-93). Helpinte la klopodojn de Humphrey Tonkin starigi Novjorkan Oficejon de UEA en 1979, la ge-



Arkivo de UEA

edzoj Manson transprenis la torĉon de Starr kiel reprezentantoj de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Ĉi tiun taskon Manson skrupule plenumis ankaŭ post la morto de sia edzino.

Funebra kunveno okazis en Novjorko la 29-an de novembro: Humphrey Tonkin kaj Rochelle Grossman faris paroladon nome de UEA resp. de E-Ligo por Norda Ameriko.

Estraro de UEA

Prezidanto (eksteraj rilatoj, kunordigo): S-ro Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain, Sydney 2041 NSW, Aŭstralio; ☎+61-2-9810-4227; ✉+61-2-9555-9705; ✉kependerby@bigpond.com.

Vicprezidanto (Kampanjo 2000, landa agado, financoj): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto,

IT-00036 Palestrina, Italio; ☎+39-06-957-57-13; ✉+39-06-957-66-33; ✉corsetti@itelcad.it.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎+39-06-39-72-61-98; ✉+39-06-39-72-61-69; ✉lipari@esperanto.nu.

Estrarano (faka kaj scienca agado, edukado): d-ro Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobříčovice,

Ĉeĥio; ☎+420-2-991-2201; ✉+420-2-991-2126; ✉chrdle@telecom.cz.

Estrarano (agado en Afriko): s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando.

Estrarano (informado): s-ro Kalle Kniivilä, Sankt Hans gränd 34 B, SE-226 42 Lund, Svedio; ☎+46-70-636-93-78; ✉Kalle.Kniivila@sydsvenskan.se.

NOVAĴOJ

de la eldona fakto
de UEA

GVIDILO PRI HOMAJ RAJTOJ

HOMAJ RAJTOJ: DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ.

Leah Levin. Ilus. Plantu. El la angla trad.

Edmund Grimley Evans. Rotterdam: UEA, 1998.

140p. ISBN 92 9017 058 1. 21cm. Prezo: 24,00 gld.

Okaze de la 50-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj UEA eldonis tiun ĉi lernolibron de Unesko pri homaj rajtoj, aperintan antaŭe jam en 16 aliaj lingvoj.

Leah Levin estas brita fakulo pri homaj rajtoj. La unua parto de ŝia libro priskribas la internacian juron pri homaj rajtoj, kun multa atento al la evoluo de la proceduroj por protekti homajn rajtojn kaj al la homrajta edukado. La dua parto klarigas la enhavon kaj signifon de ĉiu artikolo de la Universala Deklaracio. La modele tradukita kaj bele eldonita libro estas ilustrita de Plantu, fama franca karikaturisto.


HOMAJ RAJTOJ

DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ
de Leah Levin
Ilustrita de Plantu



UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

PIONIRA VORTARO POR MONDLINGVO



KLARA VORTARO ESPERANTA-ARABA. Georgo Abraham. Rotterdam: UEA, 1998. 308p. ISBN 92 9017 056 5. 22cm. Prezo: 30,00 gld.

La araba estis la sola oficiala lingvo de UN kiu ĝis nun malhavis ampleksan Esperanto-vortaron. Jen la unua paŝo por forigi tiun mankon. Post unu jaro sekvos ĝin la alidirekta volumo.

Klara vortaro Esperanta-araba rezultas el pli ol 30-jara pionira laboro. Ĝi estas klara, ĉar ĝiaj 15000 kapvortoj estas plejparte aranĝitaj laŭ la

alfabeta ordo de la vortoj anstataŭ tiu de la radikoj.

KIEL KULTURO EVOLUIGAS

KULTURO KAJ EVOLUO. Mervyn Claxton. El la angla trad. Johano Rapley. Rotterdam: UEA, 1998. 60p. ISBN 92 9017 059 X. 21cm. Prezo: 14,00 gld.

La kulturo de ĉiu popolo estas intime ligita al ĝia evoluo. Lastatempe tiu ligo rompiĝis, precipe en evolulandoj, pro adopto de la okcidenta evolumodelo kaj internaciigo de la okcidenta evolumodelo. La aŭtoro de tiu ĉi Unesko-studo — klerulo kaj eksdiplomato el Trinidad kaj Tobago — tamen montras kiel ankaŭ nun eblas utiligi la

tradiciojn de la popolo por ĝia evoluo.



TRIONA RABATO EKDE 3 EKZ. DE SAMA TITOLO ĈE LA LIBROSERVO DE UEA.

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Telefono: +31 10 436 1044

Telefakso: +31 10 436 1751

Retpoŝto: <uea@inter.nl.net>

72-a SAT-KONGRESO

Karlovy Vary, CZ

(Karlsbad - Carlsbad)

1999-07-18/24: SAT-antaŭkongreso

en České Budějovice kaj Suda Bohemio,
riĉa turisma kaj kultura programoj, vizito de
pejzaĝo 1999/2000: Ŝumava-montaro

1999-07-24/31: SAT-kongreso

en Karlovy Vary, la fame konata banloko:
interesaj faka kaj kultura programoj, allogaj
ekskursoj, naturamika kunveno,...

1999-07-31: de SAT al la Berlina UK

aŭtobusa ekskurso tra Dreseno

(ties trarigardo) al la UK-kongresejo.

Informoj kaj aliĝiloj: KAVA-PECH,
Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice

Fakso: ..420.2.9912126, tel:...420.2.9912201

Retadreso: chrdle@kava-pech.cz

<http://www.worldnet.fr/~sat-esp/>

Trinku ankaŭ vi el la akvoj de nia Fonto

Unu el la plej riĉaj libro-katalogoj
estas tiu de Fonto.

Pli ol 80 libroj, originalaj aŭ tradukitaj,
bone, bele kaj kompetente eldonitaj,
plus 18 jarkolektoj de la monata
beletra revuo FONTO.

Prestigaj verkoj kiel Rikolto, La Luzidoj,
Sed nur fragmento, Cent jaroj da soleco,
Antologio Latina... kaj la furorantaj verkoj
Lasu min paroli plu, Ili kaptis Elzan,
Gerda malaperis, Vere aŭ fantazie, de
Claude Piron, kaj multaj aliaj, troviĝas en
tiu katalogo, senpage liverebla de



Brazila Esperanto-Ligo

Ekskluziva distribuanto de Fonto

Caixa Postal 03625

70084-970 Brasília-DF

Brazilo

Fakso: 55 061 226 4446

Telefonnumero: 55 061 226 1248

bel@esperanto.org.br

Specialaj kondiĉoj por
libroservoj kaj
ceteraj revendistoj


Por senpage ricevi la katalogon, bonv

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
bela kaj moderna
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

KONTAKTO

estas gazeto
por ĉiu kiu serĉas interesan
legaĵon en Esperanto. Ĉiu
numero havas ankaŭ tekstojn
en tre facila lingvo, tiel ke
KONTAKTO estas aparte taŭga
por komencantoj kaj por
Esperanto-kursoj. Krome,
konkurso atendas vin en
ĉiu numero de la revuo!
En 1999 **KONTAKTO** aperos
6-foje. Abonu rekte de UEA
aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFO 1999

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	120 frankoj	Nederlando	40 guldenoj
Aŭstrio	250 ŝilingoj	Germanio	36 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	740 frankoj	Hispanio	2400 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	31 guldenoj	Portugalia	2500 eskudoj
Britio	15 pundoj	Italio	33000 liroj	Svedio	165 kronoj
Danio	135 kronoj	Japanio	2600 enoj	Svislando	28 frankoj
Finnlando	110 markoj	Kanado	29 dolaroj	Usono	22 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj
ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**

ANONCU EN JARLIBRO 1999!

En la Jarlibro de UEA via anonco pri Esperanto-
aranĝoj, libroj, gazetoj k.a. varoj atingos pli vastan
publikon ol en iu ajn alia Esperanto-eldonaĵo.
Pli ol 7000 aktivaj esperantistoj plurfoje vidos
vian reklamon, ĉar la Jarlibron oni konsultas
tra la tuta jaro.

Movada prezo Ekstermovada prezo

Kvarona paĝo	125 gld.	250 gld.
Duona paĝo	230 gld.	460 gld.
Tuta paĝo	420 gld.	840 gld.
Kovrilpaĝo	840 gld.	1680 gld.

Se vi varbas ekstermovadan reklamon, ni pagos
al vi 30% de la prezo kiel makleraĵon. Anonc-
mendiloj haveblas en Esperanto, la angla, franca,
germana kaj nederlanda. Limdato por la mendoj:
31-a de januaro 1999.